

# LA ONDO de Esperanto

*Internacia sendependa magazino en Esperanto*

Aperis nova biografio  
de d-ro L.L. Zamenhof  
La Eŭropa Kongreso en  
la Esperanto-urbo  
Landaj kongresoj en  
Britio, Skotlando,  
Usono kaj Svedio  
41.122 voĉoj por EDE  
Kalle Kniivilä pri  
Kaliningrado  
Kie naskiĝis la patro  
de Doktoro Esperanto?  
István Nemere verkis  
romanon pri islama  
terorismo  
La Ondo invitas al du  
konkursoj



2009

7

# LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2009. №7 (177)

**Aperas** ĉiumonate

**Fondita** en 1909 de Aleksandr Saĥarov

**Refondita** en 1991

**Eldonas kaj administras** Halina Gorecka

**Redaktas** Aleksander Korĵenkov

**Konstantaj kunlaborantoj** Tatjana Auderskaja, Peter Baláž, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Viktor Kulakov, Glebo Malcev, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloisio Sartorato, Serge Sire, Maria Sokolova

**Adreso** RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

**Telefono** (4012) 656033

**Elektronika poŝto** [sezonoj@kanet.ru](mailto:sezonoj@kanet.ru)

**Hejmpaĝo** <http://Esperanto.Org/Ondo>

**Abontarifo por 2009**

*Internacia tarifo:* 38 eŭroj

*Orienteŭropa tarifo:* 20 eŭroj

*Ruslanda tarifo:* 450 rubloj

*Pollanda tarifo:* 60 zlotoj

*Aerpoŝta aldono:* 5 eŭroj

*Elektronika abono (pdf):* 12 eŭroj por ĉiuj landoj

**Perantoj** vidu la liston sur la 27a paĝo de la februara kajero.

**Konto ĉe UEA** avko-u

**Recenzoj** Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

**Eldonkvanto** 650 ekzempleroj

**Anonctarifo**

*Plena paĝo:* 100 EUR (3000 rubloj)

*Duona paĝo:* 60 EUR (1800 rubloj)

*Kvarona paĝo:* 35 EUR (1000 rubloj)

*Okona paĝo:* 20 EUR (600 rubloj)

*Malpligrandaj:* 0,50 EUR aŭ 15 rubloj por 1 cm<sup>2</sup>

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripetito.

**Donacoj** La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

**Represoj** Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2009.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2009, №7 (177).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 22 июня 2009 г.

Цена свободная. Тираж: 650 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

## Vortoj de Komitatano Z.

### Faktoj kaj fantazioj

Mi legas, ke la monda krizo reduktis internacian turismon. Precipe suferas flugkompanioj. Inter la flugantoj certe troviĝas ankaŭ malpli da esperantistoj, ĉar iliaj monuoj ne estas pli dikaj ol tiuj de aliaj civitanoj. Tial ŝajnas neeviteble, ke ankaŭ la UK en Bjalistoko ne atingos la grandecon, pri kiu la organizantoj revis, parolante eĉ pri tri mil kongresanoj. Eble eĉ du mil ne estos atingitaj. La jubileo de Zamenhof altiros al lia naskiĝurbo pli-malpli tiom da festantoj kiel la jubileo de UEA al ties pli multekosta hejmurbo pasintjare.

Tamen la ekonomia krizo ne klarigas ĉion. Esperantistoj, kiuj estas averaĝe maldekstremaj, ne sentas sin komforte kun la nuna Pollando, kies reputacio kaj sekve allogo estis tre damaĝita dum la periodo de la konservativaj ĝemejoj Kaczyński. Por ripari la tutan damaĝon la nuna “normala” registaro ne havis sufiĉe da tempo. Simile, eĉ pli forte, okazis pri la UK en Tel-Avivo. Mono ne estis problemo, ĉar por eŭropanoj flugi al Israelo apenaŭ kostas pli ol flugoj ene de Eŭropo. Laŭ la *Jarlibro* la tiama UK havis 1212 aliĝintojn. La nombro certe estus pli granda, se la israela politiko estus pli ŝatata inter esperantistoj.

Eble UK-oj neniam plu superos 2000 partoprenantojn, ĉar ade malfortiĝas ilia bazo, la nombro de esperantistoj. Verŝajne Pollando ankoraŭ estas inter la landoj kun plej multe da scipovantoj de Esperanto, sed plejparte ili estas nur virtualaj esperantistoj. Laŭ la nombro de organizitaj esperantistoj Pollando de longe ne apartenas al la plej grandaj landoj. Krome la pollanda movado aparte reliefiĝas pro interna kverelado kiel sekvo de malnovaj frustrigoj, jaluzoj kaj rankoroj inter ĝiaj ĉefaj aktivuloj, kies plej bona movada servo estus rezigni favore al la juna generacio, kiu ne havas tian balaston.

De post la giganta Varsovia UK en 1987 UEA perdis pli ol kvaronon de individuaj membroj. Eĉ pli ŝrumpis SAT, degeneris fakaj asocioj, falis abonado al gazetoj kaj malaperis libroservoj. Naivuloj tamen donkiĥotas kontraŭ la faktoj. Lu Wunsch-Rolshoven de la germana *Esperantoland* tamtamas, ke plimultiĝo de Esperanto-renkontiĝoj klarigas malpli grandajn UK-ojn. Ke iam okazis unu novjara renkontiĝo en Germanio, la fama Internacia Semajno, kaj nun du-tri, sufiĉis por blindigi lin. Se li, aldone al sia nepre admirinda aktiveco, konus la movadan historion pli bone, li farus deklarojn pli singarde. Malaperis iam aktivaj renkontiĝejoj kiel Pisanica; Kastelo Grezijono estas nur ombro de sia iamo. La listo de perdoj estas pli longa. Manko de realismo regas ankaŭ la kapojn de tiuj, kiuj fantazias, ke UEA plurobligus sian membraron, se ĝi proponus senpage retan membrecon. Certe UEA kaj aliaj organizaĵoj enretiĝu kiel eble plej efike — kun sia reta filmĵurnalo UEA estas sur bona vojo — sed oni ne iluziu, ke tio multe efikus al la membrostadistikoj aŭ vendosumoj de libroservoj. Ni ne estas pli multaj ol ni estas. Por ŝanĝi la realon necesas unue agnoski ĝin.

*Komitatano Z*

**Sur la kovrilpaĝo** estas la foto *La reto* de Olga Ŝipovalenko (Kaliningrado), pro kiu ŝi ricevis la unuan premion en nia 11a Internacia Fotokonkurso. La 12a jam komenciĝas.

# Homarano


La 30an de julio en Bjalistoko, kadre de la Kongresa Tago de la Libro, la redaktoro de *La Ondo* premiere prezentos sian libron *Homarano: La vivo, verkoj kaj ideoj de d-ro L. L. Zamenhof*. Sed niaj legantoj povas konatiĝi kun *Homarano* jam antaŭ la Bjalistoka prezentado per la suba teksto, bazita sur la aŭtoro antaŭparolo.

Aŭtuno 1978... Tiam mi estis dudek-jara studento en Tjumeno (nord-okcidenta Azio), kaj miaj haroj estis densaj kaj malgrizaj... Antaŭ du jaroj mi eklernis Esperanton kaj eĉ partoprenis du somerajn tendarojn. Evidente, tio estis konsiderata kiel bona bazo, por ke mi mem faru prelegon pri nia kara lingvo. “Ba, senprobleme, ja mi bonege konas ĝin”, — mi pensis (hodiaŭ mi malpli alte taksas mian lingvokonon) kaj konsentis. Sed anstataŭ senprebare babili pri la dek ses reguloj kaj pri samtiom da miaj korespondamikoj en Bulgario, Hungario kaj Japanio, mi ekhavis genian ideon — mi legu iomete pri la temo kaj mi mirigu ĉiujn per miaj brilaj scioj.

En nia biblioteko studenta mi eklegis enciklopedion, poste alian... Poste mi venis al la legejo de la ĉefa publika biblioteko de la regiono, kaj mi sentis ĉiam pli klare, ke io ne estas en ordo. Sed kio?.. Ne la lingvo. Ĝi ja estis en ordo, “artefarita internacia helplingvo”, facile lernebla, logika ktp. Tamen la aŭtoro... Eĉ la nomo, tute surprize, estis ne la kutima Ludoviko, sed jen Lazarj, jen Ludvik, jen Ludvig, jen Ludovik... Aŭ la inicialoj: L.M., L.L., L. Kaj kial “Varsovia kuracisto”, sed ne simple “polo”? Aŭ, eble ne polo?..

La urbaj legejoj ne donis solvon. Sed nia Esperanto-klubo posedis etan bibliotekon, en kiu estis, interalie, kelkaj kajejoj de *Literatura Foiro*, unu el ili kun artikolo de Maimon pri la jidlingvaj studoj de Zamenhof. Tio senvualigis almenaŭ la mistereton pri la nacia aparteno de la lingvoaŭtoro.

Tiam mi ne sciis, ke mi nur ripetis la vojon de la Waringhiena “simplanima Franco”, kiu ne povis kompreni, kiel unu sola persono (kvankam kun multaj nomoj) povas esti samtempe ruslandano, varsovia, hebreo kaj, aldone, kun Litovujo kiel sia patrolando. Sed ĉar eĉ la nomon Waringhien, al kiu la simplanimulo adreŝis sin, tiutempe mi apenaŭ konis, kaj ĉar lian eseon *Unu komplikita*



*historio* mi povis traĝui nur jarojn post la unua biblioteka fosado, mi komencis, iom post iom, kolekti mian propran zamenhofologian biblioteketon, kaj nun mi aldonas al ĝi mian modestan kontribuon.

Kelkaj dekomencaj klarigoj verŝajne estas necesaj por preventi demandojn, kiuj eble aperos dum la legado de *Homarano*.

La unua koncepto pri ĝi estis dokumenta romano kun multaj tekstoj tiutempaj kaj kun nur malmultaj komentoj inter la tekstoj. Sed kolegoj konvinkis min ŝanĝi la koncepton kaj plimultigi mian propran kontribuon. Al tiuj, kiuj volas pli bone konatiĝi kun la verkoj de Zamenhof mem, mi rekomendas legi la Zamenhofan kolekton *Mi estas homo* (MEH), kiu entenas liajn plej gravajn tekstojn pri temoj nelingvaj.

Kvankam en ĉi tiu libro estas malpli da citaĵoj ol planite, mi preferis, ke en ĝi laŭeble parolu Zamenhof mem, liaj samtempuloj kaj aliaj zamenhofologoj, sed ne mi rerakontu iliajn vortojn. La Zamenhofaj citaĵoj estas prenitaj plejparte el MEH kaj el la trivolumenta Ludovikita *Originalaro*.

Unu teksto el MEH aperas kiel prologo — ĝi estas letero, kiun Zamenhof skribis la 21an de februaro 1905 al Alfred Michaux. Antaŭ ol eklegi la libron mem, bonvolu atente tralegi ĉi tiun leteron kaj poste, dum la legado, tenu en la memoro la vortojn de Zamenhof:

kvankam de mia plej frua infaneco en mi ĉiam superregadis la “homo”, tamen pro la malfeliĉega stato de mia popolo, en mia koro ofte vekigadis la “patrioto”, kiu terure bataladis en mia koro kontraŭ la “homo”.

Ĉi tiu interna batalado inter diversaj idealoj kaj diversaj celadoj turmentadis Zamenhofon dum lia tuta vivo, kaj en ĝi oni devas serĉi la ŝlosilon al ĉiuj gravaj turnoj en la Zamenhofa vivo.

Por malpezigi la legadon mi enmetis kelkajn “leĝerajn” fragmentojn, ekzemple, el la rememoroj de Vasilij Devĵatinin. Ili havas malmulte da fakta valoro (kaj multe da eraroj), sed ili bone transdonas la etoson, la impresojn, la spiriton de la epoko. Simple, ne legu ilin, se vi serĉas nur faktojn.

Estus tre facile fari la libron pli ampleksa per pli detala priskribado de la historia fono. Sed *Homarano* estas libro pri Zamenhof, ne pri la historio de Ruslando aŭ Pollando, nek pri liatempaj judaj sociaj doktrinoj, nek pri plia sorto de la Zamenhofa familio. En la libro estas traktataj nur tiuj “ekstertemaj” eventoj kaj tendencoj, kiuj estas bezonataj por kompreno de la vivo kaj ideoj de Zamenhof. Ĝi ankau ne estas libro pri Esperanto, kaj mankas en ĝi klarigo pri la strukturo de la lingvo, kiun supozeble konas ĉiu leganto esperantista.

Verkante *Homaranon*, mi uzis multajn verkojn konatajn, sed kelkaj el la konsultitaj fontoj ĝis nun ne estis konataj en Esperantujo. Mi prenis ilin en bibliotekoj kaj arkivoj de Grodno (Belorusio), Kaŭno (Litovio), Peterburgo kaj Moskvo (Ruslando), kiujn mi vizitis danke al subvencio de *Esperanto Studies Foundation* (ESF). Kelkajn interesajn informojn mi ricevis de zamenhofologoj kaj neesperantistaj historiistoj.

*Homarano* estis pretigata en la kondiĉoj de forta tempopremo, ĉar ĝi devus nepre aperi antaŭ la 94a Universala Kongreso de Esperanto en Bjalistoko. Pro tio mi ne sukcesis sendi la tekston al ekstereldoneja fakulo por kontrolado. Korektojn, atentigojn, komentojn kaj proponojn bonvolu sendi poŝte al nia redakcia adreso.

Aleksander Korĵenkov



## UEA denove ĉe Unesko

Tripersona delegitaro de UEA estis tre varme akceptita en Unesko la 8an de junio. Ĝi konsistis el la konstantaj Unesko-representantoj de UEA Barbara Despiny kaj François Lo Jacomo kaj el eksprezidanto Renato Corsetti. Antaŭ la vizito prezidanto Probal Dasgupta sendis al Unesko detalan raporton pri la kontribuo de UEA al la Internacia Jaro de Lingvoj en 2008. La temaro de la Jaro estis multmaniere pritraktata en UEA kaj ĝiaj landaj asocioj. La plej pintaj kulminoj en tio estis la 93a UK en Roterdamo en julio, kies kongresa temo kombinis la Jaron de Lingvoj kun la 100-jariĝo de UEA, kaj la konferenco en la Pariza sidejo de Unesko en decembro, kiu samtempe fermis la Jaron de Lingvoj kaj malfermis la Zamenhof-jaron.

La delegitaro de UEA estis unue akceptita de la programspecialisto Mauro Rosi. Montriĝis, ke li funde pristudis la dosieron de UEA, komisiite de Françoise Rivière, asista ĝenerala direktoro pri kulturo, al kiu ĝi estis direktita. Post preparaj diskutoj kun Rosi, la reprezentantoj de UEA estis akceptitaj de s-ino Rivière mem. Rosi resumis al la asista ĝenerala direktorino la raporton de UEA, ne forgesante elstarigi la rapidecon kaj efikecon, kun kiuj UEA organizis tradukadon de la inaŭgura mesaĝo de la ĝenerala direktoro de Unesko pri la Lingvojaro al kvardeko da lingvoj pere de Esperanto.

Dum la renkontiĝo kun s-ino Rivière la reprezentantoj de UEA prezentis al ŝi ankaŭ la proponon de UEA, ke la Jaro de Lingvoj ricevu daŭrigon en formo de Internacia Jardeko de Lingvoj. La asista ĝenerala direktorino trovis la ideon tre interesa, ne laste pro tio, ke laŭ ŝi la Kultura Fakto de Unesko estas nun pli ol antaŭe premata por agi favore al lingvoj. Dum la lasta parto de la renkontiĝo oni diskutis pri la eblecoj kaj la plej sekvinde vojo por antaŭenigi la ideon pri la Jardeko. En Unesko pri deklaro de temaj jaroj kaj jardekoj kompetentas la Ĝenerala Konferenco, al kiu nur la membroj-ŝtatoj rajtas fari proponojn. Sekve necesos silenta diplomatio kaj premagado por akiri la subtenon de sufiĉa nombro da ŝtatoj kaj por persvadi ilin fari proponon. La sekva Ĝenerala Konferenco, al kiu eblus submeti ĝin, estos en oktobro 2011. Sukceso tie povus do signifi, ke la Jardeko de Lingvoj daŭrus de 2012 ĝis 2021.

GK UEA

## UK: La afero de la tuta nacio

Ĝenerala Direktoro de UEA, Osmo Buller, 26–29 maj 2009 vizitis Vjetnamion por inspekti surloke la kondiĉojn de eventuala okazigo de Universala Kongreso (UK) en la jaro 2012.

Li estis akceptita de s-ro Tran Dac Loi, vicprezidanto de Vjetnama Unio de Amikecaj Organizoj (VUAO), kiu prezentis ĝeneralajn trajtojn de Vjetnamio. Duong Nguyen Tuong, estro de oficejo de VUAO, raportis, interalie, pri sperto de Vjetnamio en la organizo de internaciaj konferencoj, pri loĝado, komunikado kaj emfasis, ke la organizo de la kongreso estas la afero de la tuta nacio. Nguyen Xuan Thu, ĝenerala sekretario de UEA, prezentis la Esperanto-movadon en Vjetnamio, la antaŭajn regionajn kaj internaciajn Esperantajn kongresojn en Vjetnamio, la kontinuan trejnadon de esperantistoj kaj de la UK-helpantoj.

En posta interparolado estis traktitaj diversaj ĝeneralaj kaj praktikaj demandoj, interalie, pri la surlokaj kondiĉoj, pri helpantoj, pri vizitoj.

Osmo Buller vizitis la Nacian Kongresan Centron en My Dinh, la Fremdlingvan Universitaton, grupon da hoteloj en Tay Ho kaj diversajn vidindaĵojn de Vjetnamio. Fine, li partoprenis inaŭguron de memortabulo starigita ĉe la Zamenhof-arbo plantita en la dua Azia Esperanto-Kongreso (1999) kaj disdonis kursfinajn atestilojn al pli ol tridek esperantistoj, plejparte gejunuloj.

Nguyen Xuan Thu

Nguyen Thi Ngoc Lan

Sur la foto: Osmo Buller en Vjetnamio.



## La Eŭropa Kongreso

28 maj – 3 jun 2009 en la Esperanto-urbo Herzberg am Harz okazis la 8a Eŭropa Esperanto-Kongreso kaj la 86a Germana Esperanto-Kongreso kun la ĉeftemo *Esperanto por multkultura Eŭropo*. Partoprenis ĉ. 400 gastoj el 27 landoj.

La surloka gimnazio kun la belega aŭlo estis ideala kongresejo. Tri radiostacioj informis multfoje pri la eksterordinara kongreso. Venis multaj ĵurnalistoj por informiĝi pri la fenomeno “Esperanto-urbo”. Peter Zilvar prelegis pri la Esperanto-urbo kaj la komuna kongreso dum la kunsido de la urba konsilio. Okazis du ekspozicioj (en la kavallira salono de la kastelo pri la lingvo Esperanto kaj en la urba biblioteko pri raraj multspecaj Esperanto-kolektaĵoj far Stany Rynduch).

Pli ol 60 prelegoj, seminarioj, ekzamenoj, kursoj por komencantoj kaj progresintoj apartenis al la programo.

Ekumena diservo far pastro Albrecht Kronenberger kaj pastoro Peter Bäß en la katolika kirko Sankta Jozefo estis tre ŝatata. Ducent kongresanoj partoprenis procesion (paradon) tra la urbo. Multaj uzis landajn flagojn, Esperanto-flage-tojn kaj verdajn ombrelojn kun la surskriboj *Esperanto* en blankaj literoj. Tio estis okulfrapa varbado.

Pro la fakto, ke la loka politiko kaj la Esperanto-movado nun troviĝas en la “sama boato de la espero” partoprenis politikistoj el ĉiuj partioj, ankaŭ deputitoj. Nia urbestro Gerhard Walter jam parolis en Esperanto kaj rikoltis longan aplaŭdon. La ĉefo de la subdistrikto Bernhard Reuter faris longan prelegon pri la avantaĝoj de Esperanto en la nova Esperanto-urbo.

Kvar kulturvesperoj en la belega aŭlo peris variajn impresojn. Ekzemple, kantis la gimnazia koruso en Esperanto. La plej altnivela prezento estis la kantado far la hungara parlamenta koruso *Senatorok*. Christof Frankà ludis la teatraĵon *Munkhaŭzo — la aparta kazo*. Ralph Glomp el Hamburgo prezentis dufoje eksterordanaran kantadvesperon. Ulrich Mattke ludis la “Esperanto-himnon” kaj Alfons Hoffmann kantis klasikajn kantojn. Georgo Handzlik prezentis sian ŝatatan repertuaron. La polaj dancensemloj *Rytmix* kaj *Baby Yagi* prezentis diversstilajn dancprogramojn. Longas la programeroj. La unika programo en la vivanta medio “Esperanto-urbo” restos en la memoroj kaj koroj.

ICH/GEC

## Unu kongreso por multaj organizoj

Borlänge en la bela meza parto de Svedio estis loko de la sveda jarkongreso 22-24 maj 2009. La diskutoj inter la 60 partoprenantoj estis viglaj, kaj komenciĝis per la demando ĉu ni bezonas niajn organizaĵojn. Pluraj el tiuj organizaĵoj jarkunvenis aŭ membrokunvenis dum la jarkongreso.

Tri programeroj allogis la partoprenantojn. Paŭlo Gubbins el Britio prelegis pri la brita lerneja projekto *Lingvolanĉilo*, unue menciante kio la projekto ne estas, poste kun konkretaj informoj pri ĝi. Aŭtobusa ekskurso dum la tago antaŭ la jarkongreso iris al du mond-konataj lokoj en la provinco ĉirkaŭ Borlänge: al kuprominejo kaj al subĉiela salono por operoj. Junulara kunveno kun la nomo Anemona Renkontiĝo allogis junan grupon.

Inter la jarkunvenoj, la plej grava estis tiu de Sveda Esperanto-Federacio. La propono de la estraro pri altigo de la membrotito ne ricevis subtenon de la partoprenantoj, kaj la estraro devis retiri sian proponon. Kooperativo Esperanto-Domo en (relative) proksima urbeto Lesjöfors kunvenis, la sveda sekcio de KELI kunvenis, la junulara SEJU jarkunvenis, kaj la sveda ILEI-sekcio aranĝis membrokunvenon anstataŭ jarkunvenon pro praktikaj problemoj en la preparo. La Sveda Esperanto-Instituto, kiu estas kunlabora organo por komunaj demandoj de instruado de Esperanto, faris la inviton al la komenca diskutkunveno pri niaj organizaĵoj.

Neanoncita estis prelego de instruisto el la altlernejo de la apuda urbo Falun, Konstantin Andrejev, kiu rakontis pri la aktivecoj de tiu altlernejo en interreta instruado de lingvoj, kaj invitis al kunlaboro. Neanoncita estis ankaŭ la plej facila prelego, kiam Paŭlo Gubbins montris bildojn pri sia privata ĝardeno ferojeto. En kunligo kun la kunveno de la sveda ILEI-sekcio, Kaisa Hansen prezentis ideon pri projekto de instruado de Esperanto al instruistoj. Bone planita estis la prelego de Gunnar Gällmo pri historio de tradukado.

Post la kongreso, en Svedio okazos semajna kurso en la Esperanto-Domo en Lesjöfors, kaj kursoj pri Esperanto en popolaltlernejo de Visingsö. Aŭtune 2009 estas planataj kunvenoj de SEJU (Oranĝa renkontiĝo), jarkunveno de la sveda sekcio de ILEI kaj kunveno de Esperanto-Domo en Lesjöfors.

**Ulla Luin**



Triesto: Kelkaj fervojistoj en diverslandaj uniformoj

## IFEF: La kvinan fojon en Italio

La 61a kongreso de IFEF (Internacia Fervoja Esperanto-Federacio) okazis la 23–29an de majo en Triesto, en la plej nordorienta parto de Italio. Ĝi estis la 5a kongreso de IFEF en Italio: 1954 en Verona, 1970 en Rimini, 1978 en Roma, 1993 en Cervia.

En Triesto oni celebris la centjariĝon de IFEF mem per kongreso riĉa je programeroj, aperigo de du turismaj broŝuroj en Esperanto kaj de aparte riĉa kongresa kajero 78-paĝa.

Pli ol 200 kongresanoj el 19 landoj, inter alie el Ĉinio, diligente sekvis la fakajn prelegojn, vizitis la urbon kaj ĉirkaŭaĵojn, atente kaj gaje ĉeestis la teatrajn prezentojn.

En la inaŭguro partoprenis reprezentantoj de la komunuma kaj de la provinca administracioj, pluraj kongresanoj vestis sian fervojan uniformon, la delegitoj kiuj salutis plejparte kunportis tre aprezatajn donacojn, kaj por kroni la tuton, loka asocio nomita *La 13 nobelaj triestaj familioj* (familioj kiuj regis la urbon antaŭ multaj jarcentoj) prezentis bonvenigan ceremonion en mezepokaj kostumoj kaj kun mezepokaj kantoj, doninte al la ĉeestantoj panon kun salo kaj glason kun vino kiel signo de bonakcepto.

La fakaj prelegoj estis abundaj, tre interesaj, preskaŭ profesie prezentitaj. Terminologia komisiono diskutis specifajn temojn, necesajn kaj utilajn por pliriĝo de la faka terminaro.

Elstaris prelego pri *Violonfarada arto* de la italo Gianni Orsini, kiu ne nur amas violonojn, sed ankaŭ konstruas ilin

kaj menciindas per-bilda prezento de la urbo Triesto.

Oni povis ĝui plurajn teatrajn prezentojn: Saša Pilipović distris la publikon per *Universala Kabaredo*, François Stride gitare kaj Margerita akordeone ludis klasikan muzikon, Giuliano Turone monologis *Pri la malutilo de la tabako*. En la Regiona Vespero, rolis la virinvoĉa koruso I.Grbec de Servola/Triesto kaj la tradicikostuma grupo *Bisiachi* de urbeto Turriaco, kiuj kantis ankaŭ en Esperanto. La klasik-muzika vespero sukcesis danke al Egle Jarkova el Litovio (violono) kaj Sergio Escalera el Bolivio (fortepiano). Ĉe la kongresa fermo koruso de la urbo Triesto prezentis kantojn itale kaj Esperante, inter alie la Himnon, kiu belege signis la finon kaj transdonon de la kongresa flago al s-ino Kamburova el Bulgario.

Pluraj ekskursoj permesis pli bonan konatiĝon kun Triesto kaj la regiono. Krome: porokaza filatela stampo kun specialaj kovertoj vekis grandan intereson; ili estas ankoraŭ haveblaj.

Entute tre sukcesa aranĝo!

Aldona noto: dum Esperanto-aranĝo oni supozas ke la partoprenantoj scipovas la internacian lingvon Esperanto, ĉu ne? Sed ankaŭ ĉi-foje pluraj personoj ne kapablis diri eĉ vorteton, kio minimume implicas miskomprenojn kaj disdividojn inter la kongresanoj. Tio ne estas en la spirito de nia Esperanta kunestado.

Nur makulo sur ĝi: la konduto de kelkaj rumanaj partoprenintoj, kiuj serioze damaĝis la lokajn organizintojn. Estas ege bedaŭrinde, ke pro malbona konduto de iuj la kulpo surfaldu la ceterajn.

**Edvige Ackermann**



## La 104a en Skotlando

Mi eklernis Esperanton nur antaŭ ses monatoj, kaj kiam mi aŭdis pri la 104a Skotlanda Kongreso, mi decidis, ke mi certe ĉeestos. La kongreso okazis 5–7 jun 2009 en Dundee, la hejmurbo de la prezidanto de la Esperanto-Asocio de Skotlando (EAS), Andrew Weir.

Dum la solena malfermo, ĉe la urbo-domo, la vicurbestro de Dundee, Ian Borthwick, bonvenigis nin, kaj oni prezentis al ni nian gastparolanton Stano Marček, la redaktoron de *Esperanto*. Kiam ni revenis al la kongresejo, mi konatiĝis kun aliaj ĉeestantoj — ili estas ĉiuj afablaj kaj altnivelaj parolantoj, sed mi ankaŭ rimarkis, ke nur Andrew kaj mi estas student-aĝaj — estas domaĝe, ke ne estas pli da junuloj en EAS.

La unua okazaĵo de la sekvonta tago estis prelego de nia gasto, Stano Marček pri sia rekta metodo de Esperanto-instruado. Posttagmeze ni ekskursis al fruktvinfarejo en Cairn o' Mohr. Poste okazis diservo por la kristanaj esperantistoj, kaj samtempe okazis tio, kion oni ŝerce nomis “fiservo” por la aliaj — diskutrondo gvidita de Andrew pri la interrilato inter religio kaj Esperanto, kiu poste fariĝis babilado pri la homaranisma filozofio de Zamenhof.

En la vespero okazis bankedo. La finan tagon komencis du pluaj altnivelaj prelegoj: prelego de Hju Rid pri kiel Esperanto povus pli efikiĝi, se ĝi havus sian propran ekonomion, kaj prelego de Stano pri la historio de la revuo *Esperanto*.

Posttagmeze okazis grupdiskuto. Oni donis al nia grupeto la temon “Ĉu Esperanto sen ideologio estas kiel trajno sen fervojo?” David Kelso, kiu ŝajnis tre lerte vortludi, respondis, ke Esperanto povas bone funkcii sen ideologio, do ĝi ne estas trajno sen fervojo, sed pli ĝuste trolebuso!

En la jarkunveno de EAS oni decidis, ke la venonta kongreso okazos en Berwick-upon-Tweed, kaj Andrew, la prezidanto, kiu baldaŭ transloĝiĝos eksterlanden fermis la kongreson. La nova prezidanto iĝis Ed Robertson.

Do mi volas diri koran dankon al Andrew pro bonege aranĝita kaj plezura kongreso, kaj al David Kelso pro la subvencio de lia fondaĵo — por mi la kongreso estis bonega okazaĵo aŭdi parolatan Esperanton, gustumi vinon, kaj rimarki kiel rapide oni povas kompreni Esperanton post eklerni la lingvon. Dankon al ĉiuj en EAS!

Ŝej Bishnoi



## Usona kongreso

La 57an kongreson de Esperanto USA (Sankta Luiso, 22–25 maj) mi trovis tre interesa kaj mi vere ĝuis ĝin.

Preskaŭ la tutan vendredon okupis la estrarkunsido kaj ekskurso al la Arkego. Humphrey Tonkin venis por paroli al la estraro pri eventuala kunlaboro de Esperantic Studies Foundation kaj Esperanto-USA.

La sabataj retaj kontaktoj kun alilandanoj estis interesaj. Duncan Charters antaŭe aranĝis la aferojn, kaj, uzante lian ekipaĵon, la partoprenantoj interparolis per *Skype* kun grupoj en Brazilo, Meksiko kaj Ĉinio. La plej impona estis la aranĝo kun Katalin Kováts, kiu parolis pri sia laboro kaj retpaĝaro *Edukado.net* — kaj ŝi ne estis en la ĉambro, sed en alia parto de la mondo: en Nederlando, fakte.

Lusi Harmon raportis pri la stato de la kurso *Pasporto al la tuta mondo* kaj ties uzo en la reto. Vilĉjo Harris parolis pri la aferoj ĉe nia Centra Oficejo. Boris Kolker parolis pri modernaj rimedoj por reteni homojn en Esperantujo. Vespere Lusi Harmon gastigis la kutiman akcepton por UEA-delegitoj. Tuj poste okazis la bankedo kun bongustaj manĝaĵoj kaj agrablaj kunĉeestantoj, kaj distraĵoj kiujn gvidis Sherry Wells, Aminda Diehl kaj Darcy Ross.

En la dimanĉa Diservo, gvidata de Filipino Dorcas, ni diskutis kelkajn partojn el la Biblio. Poste Boris Kolker prelegis pri sia libro *Vojaĝo en Esperantlando*. Alia interesa programero estis la diskutrondo pri Esperanto kaj la interreto, gvidata de Steven Brewer. Ellen Eddy parolis pri NASK, kaj Mar Cardenas pri sia agado kun skoltinoj. Vespere oni spektis filmojn en Esperanto.

Anna Bennett

Dundee: la prezidanto de EAS, Andrew Weir, kun la vicurbestro Ian Borthwick. (Fotis Hju Rid)

## MeKaRo 2009

MeKaRo estas Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto. Ĉi tiu senkotiza esperantista turisma evento okazas dum la kanada feria semajnfino “Viktoria”, ĉi-jare en Toronto, inter la 16a kaj 18a de majo, kun partopreno de 31 esperantistoj. Ili venis por interkonatiĝi kun esperantistoj el diversaj urboj kaj ankaŭ iom ekkoni la gastigantan urbon kun lokaj esperantistoj kiel gvidantoj.

Sabate pro forta pluvo, anstataŭ promeni, ni restis en la festoĉambro, babilante kaj manĝetante kukon kaj torton. La dolĉaĵoj kaj teo kaj kafo estis senpagaj, kaj daŭre haveblaj. Fruvespere, post ĉeso de la pluvo, preskaŭ ĉiu iris al proksima vjetnama restoracio por kune vespermanĝi. La vespera programo, post sinprezento de la ĉeestantoj, inkluzivis esperanto-vortludojn de Jogo, kaj iom da pianludado de Jeremio.

Dimanĉe la vetero estis bela, kvankam kun iom malvarma vento. Post la matenmanĝo ni rekunvenis en la festoĉambro por dividiĝi en grupojn por fari la elektitajn promenojn/ekskursojn. Iuj iris al AGO, la Arta Galerio de Ontario. Aliaj ekskursis kun Skoto piede kaj trame por rigardi konstruaĵojn de arkitektura vidpunkto en la universitata kaj aliaj kvartaloj.

Je la fino de la posttagmezo oni renkontiĝis en la festoĉambro por re-dividiĝi en grupojn, laŭ la manĝaĵpreferoj. Oni decidis ne iri al diversaj kvartaloj, sed ĉiuj konsentis iri al la hinda kvartalo, por vidi ĝin, kaj tie manĝi. Tri grupoj formiĝis por iri al tri restoracioj, proksimaj unu de la aliaj. Unu estis ekskluzive vegetara, unu sudhinda (spicaj manĝaĵoj), kaj unu nordhinda (milde spicita).

Vespere Francisko Lorrain prelegis amuze kaj tre sprite pri “la problemo pri niaj GEnuoj”(!). Poste ni rigardis kelkajn esperantlingvajn DVD-ojn, ĝis malfrua horo devigis nin foriri por dormi. Iuj tiam adiaŭis, ĉar ili devos matene jam ekveturi por longa veturo hejmen. Aliaj renkontiĝis lunde matene por manĝi en alia proksima restoracio, antaŭ ol reiri al siaj urboj.

Francisko Gauthier invitis veni al Tri-Riveroj post unu jaro, kaj esplori tiun urbon kiu situas meze inter Montrealo kaj Kebeko, sur la bordo de la rivero de Sankta Laŭrenco.

K. P.

## Ĉinio: Junularo kaj interpacigo

La unua Junulara Esperanto-Seminario okazis 22–24 maj en la ĉarma nord-ĉinia urbo Harbino, kie viglas grupo da gestudentaj esperantistoj, gvidataj de la instruistino Song Ping. Pli ol 60 samideanoj el Ĉinio kaj Ruslando ĉeestis la seminarion.

En la Interkona Vespero gejunuloj distiris la kurtenon de la seminario per la ĥora himno *La Espero*. En la inaŭguro ĉiuj stariĝis por omaĝi al la forpasinta japana esperantisto Kurisu Kei, kiu dum multaj jaroj klopodadis por la japana-ĉina amikeco per Esperanto.

Parolante pri la seminaria ĉeftemo *Junularo kaj interpacigo*, la ĉina studentino Zhu Yanwei, diris interalie: “Danke al la interna ideo pri paco kaj amikeco Esperanto gajnas aprobadon de pacamaj popoloj, kaj disvastiĝas tra la mondo. Por disvastigo de Esperanto-movado estas bezonata ne nur amo de popolanoj, sed eĉ pli kontribuado por disvastigi ĝin. Ni, junularo, estas dum la kreskanta etapo de nia vivo, per nia juneca impulso ni akcelu prosperon de Esperanto-movado, tio ja estas la sincera deziro en la koro de ĉiu esperantisto”.

La ĉeestantoj varme diskutis la seminarian temon. Aleksandr Titajev el Vladivostok parolis pri la junulara Esperanto-movado en Ruslando antaŭe kaj nun. Hu Guozhu prelegis pri “100 jaroj de Esperanto en Ĉinio”; lia rakonto kun abundaj bildoj, kiuj estas projekciataj sur ekranon, interesis la ĉeestantojn. La konversacia kurso, gvidita de Liu Minghui, kiu okazis en la salono *Kurisu Kei*, paroligis komencantojn.

Dum la seminario ĉiuj ĉeestantoj vizitis la lokon de la 731a bakteriologia trupo de la japana invada armeo dum la 2a mondmilito kaj turisme vizitis la ĉarman riveron Songhua, la monumenton kontraŭ inundo, la rusortodoksan katedralon de Sankta Sofia, la pitoreskejon Suna Insulo kaj la gajan piediran Centran Straton.

En la fermo Song Ping, la gvidantino de LKK, emfazis, ke malgraŭ la mallonga seminaria tempo, ĝi starigis amikecon inter la partoprenantoj, kaj kontribuis al la prosperado de la Azia junulara Esperanto-movado.

Post la seminario parto de la seminarianoj aŭtobuse pilgrimis al la tombo de Verda Majo en urbo Jimusi. La seminario enverŝis la junecan vivforton en la iom-post-iome maljunuliĝan ĉinan, eĉ en la Azian Esperanto-movadon.

**Shi Chengtai**

## Unu el la plej ĝueblaj kongresoj

La ĉi-jara Brita Kongreso okazis 17–20 apr en Sarum College, kiu situas en la belega okcidentangla urbo Salisbury. La organizantoj estis Jean kaj David Bisset, kiujn oni devas varme danki kaj gratuli, precipe pro la fakto, ke ili — loĝantoj de fora “Kaledonio severa kaj sovaĝa” — brile sukcesis efektiviĝi ĝin en suda regiono, kiu antaŭe ne estis al ili bone konita. Por ni ĝi estis unu el la plej ĝueblaj Kongresoj, kiujn ni iam partoprenis.

Krom esperantistoj el Anglio, Kimrio kaj Skotlando (inkluzive de kelkaj eksterland-devenaj loĝantoj de Britio) partoprenis geamikoj el Pollando, Francio, Ukrainio, Nederlando kaj Irlando.

La vendreda programo konsistis el artisma promenado gvidita de Joyce Bunting; prelego de David Bisset pri William Butterfield kaj aliaj arkitektoj kiuj laboris en Salisbury; parolado (proza, ne poezia) de nia altestimata poetino Marjorie Boulton; kaj tre amuza (kaj erudita!) prelego pri la fama gaŭlo Asterikso, fare de Andrew Weir, prezidanto de la Esperanto-asocio de Skotlando.

Ankaŭ la sabataj kaj dimanĉaj prelegoj estis elstaraj. En la sabato ni aŭskultis la kontribuajn *Esperanto — ne nur lingvo?* de David Kelso, en kiu li enprofundigis nin en la ideologion de Zamenhof kaj en la koncepton de la Interna Ideo; valoregan kaj profunde esploritan kontribuajn al nia scio pri unu el la plej gravaj esperantistoj, Gaston Waringhien, fare de Graham Blakey; prezentajn *Preparado por UK* (t.e. la Bjaliŝtoka) de Przemek Wierzbowski; kaj interesan prelegon de la eferverska kaj fervoj-amanta Paul Gubbins pri la *Wessex*-romanisto Thomas Hardy. La vespero finiĝis per kvizo (tre malfacila!) direktita de Claire Hunter kaj Bill Owen.

Harbino: La junularo per sia juneca impulso akcelas prosperon de Esperanto-movado



Dimanĉe okazis Ekumena Diservo gvidita de Geoff Wood kaj Martyn McClelland. Poste, Hugh Reid faris atentokaptan prelegon kun la intence provoka titolo *Esperanto — ĉu parazito?*; kaj Derek Tatton organizis la Dronon (diskut-rondon). Plie, ne mankis la drama arto. Paul Gubbins kaj aktoroj (Sally Phillips, Peter Bolwell kaj aliaj) amuzige prezentis la teatraĵon *La Sono de la Kursgvidanto* de Marjorie Boulton. Kanoniko Judy Rees prezentis informon pri la religia poeto George Herbert, kaj sekve John Wells faris unu el liaj kutime fascinaj doktaj prelegoj: *La Frazmelodio en Internacia Perspektivo*. En la vespero ni bankedis en loka hotelo, kie Harry Barron invitis nin al la venonta brita kongreso en Llandudno.

Grupo da kongresanoj, kiuj restis en Salisbury ĝis la lundo ekskursis en bela printempa vetero al Bemerton, Old Sarum kaj la Avebury Ring, unu el la plej gravaj arkeologiejoj en Anglio. Entute, la etoso, gastigo, komforto, manĝaĵo kaj prelegoj apenaŭ povus esti superitaj.

**Girvan kaj Máire McKay**

## Nova kurso ĉe UNAM

13 jun 2009 komenciĝis seminario kaj kurso pri Esperanto ĉe la Postgrado de la Jura Fakultato de la Universitato Nacia Aŭtonoma de Meksiko (UNAM). Ĉe UNAM ekde 2003 eklernis Esperanton 320 studentoj, kaj 170 el ili finis la kurson.

La nunaj kurso kaj seminario estas organizataj de Meksika Esperanto Federacio. Instruas la lingvon Daniel Moreno, kaj la germana aktivulo Martin Shaeffer instruas en la seminario pri agado por Esperanto. La kurso kaj la seminario okazas lige kun la Meksika Esperanto-Kongreso.

**Luis Córdova Arellano**



## 41 mil 122 voĉoj por EDE

En la Eŭropaj Balotoj en junio 2009 la politika movado *Eŭropo — Demokratio — Esperanto* (EDE) akiris 29 mil 263 voĉojn (0,17%) en Francio kaj 11 mil 859 voĉojn (0,05 %) en Germanio. Dum en Francio la procentaĵo estis plej alta en la transmaraj regionoj (0,44%), en Germanio EDE estis relative sukcesa en nordoriento (0,15% en Meklenburgo-Antaŭpomerio) kaj sudokcidento (0,06% en Baden-Virtembergo).

Kompare kun la antaŭaj balotoj de 2004, la nombro de voĉoj por EDE en Francio kreskis je 4 mil 004. En Germanio EDE unuafoje partoprenis en balotoj kaj akiris la 29an lokon inter 31 partioj. Tiu rezulto ne plenumis la esperojn de multaj aktivuloj de EDE, tamen ĉiu el ili planas daŭrigi sian agadon por atingi pli bonan rezulton en 2014.

Ĉefaj ideoj por tio estas pli alloga televida filmeto kaj pli profesinivela retejo. La varban filmeton de EDE spektis ĉirkaŭ 5 milionoj da homoj en germana televido kaj pliaj 35 mil homoj en la retejo de *Youtube*. Unu el la ĉefaj roluloj de tiu filmeto estis la unua kandidato de EDE, la nobelpremiito Reinhard Selten, kiu emfazis antaŭ kamerao: “Mi senrezerve subtenas Esperanton. Esperanto servas kiel dua lingvo por ĉiu al kompreniĝo inter la popoloj kaj al paco, kaj helpas kunkreskigi la eŭropajn popolojn”.

Danke al la elektokampanjo de EDE, dum la semajnoj antaŭ la balotoj multe kreskis la interesiĝo pri Esperanto en Germanio kaj Francio. La aliĝoj ĉe *lernu.net* altiĝis je ĉ. 60% en Germanio kaj je ĉ. 200% en Francio. En Germanio ankaŭ forte kreskis la vendado de libroj pri Esperanto ĉe *Amazon* (ekzemple la vendo-rango de Esperanta vortaro altiĝis de ĉ. 100.000 al ĉ. 12.000).

En Germanio EDE havas nun nur 30 membrojn kaj havis dum la elektokampanjo financajn rimedojn de nur ok mil eŭroj. Komparante tion kun la rimedoj de aliaj partioj (kaj ankaŭ kun EDE-Francio, kiu estis ĉ. kvinoble pli granda kaj pli riĉa), la nombro de 11 mil 859 voĉoj tamen povas aspekti kontentige, eĉ se post la kolektado de ses mil subtenaj subskriboj multaj antaŭvidis pli bonan rezulton.

En la venontaj jaroj EDE intencas fondi pliajn landajn sekciojn, kun la celo partopreni en la Eŭropaj Balotoj de 2014 en kelkaj pliaj landoj.

**Ulrich Matthias**



Werner Lewien kaj Werner Pfennig post pendigo de afiŝo en Neubrandenburg, kie EDE estis plej sukcesa kompare kun aliaj regionoj. (Fotis Fred Sager)

## Rezigni pri paŭzo por debati

La 65an printempan Staĝon de Esperanto France-Est organizis “Mulhouse Esperanto” 20–22 mar proksime al Colmar. La vendredan vesperon oni konatiĝis kun Togolando kaj kun la disko *Esperanto estas...*

Sabate matene okazis la turisma programo en la valo de Metzeral kun vizito al la muzeo La Schlitte kaj al lignoŝuisto. Posttagmeze komenciĝis la kulturaj programoj. Jean-Luc Thibias prezentis novajn librojn. Poste startis la kursoj A, B kaj C en respektivaj ĉambroj, kiujn respektive gvidis Ginette, Roberto, kaj Edmond. En la granda salono okazis prelegoj de Kristin Tytgat (Kiki) pri “Interkultura dialogo kaj la signifo por esperantistoj”. Dank’ al siaj multaj personaj spertoj, ŝi povis doni tre konkretajn ekzemplojn, kie pro kulturaj kutimoj okazas miskomprenoj malgraŭ komuna lingvo. La temo tiom kaptis la atenton de la partoprenantoj, ke dimanĉe unuanime estis decidite rezigni pri paŭzo por daŭre ĝui la debatojn.

La hungara kantistino Anjo Amika agrable plenigis la vesperan programon.

Dimanĉe revenis la kursoj al siaj kursoj. En la prelego de Kiki refoje abundis la publiko kun eĉ pli da entuziasmo. Dume vizitis la staĝon ĵurnalistoj el la regiona televido FR3 por intervjui partoprenantojn. La elsendo estis spektobla sekvatage en la vespera programo. La lasta programero estis vizito al fromaĝisto en la vilaĝo Hohrod.

**André Grossmann**

## En Pariza kafejo

Komence ni estis du “iniciatantoj”, parizanoj en la deka Pariza kvartalo, kiuj renkontiĝis en la reto. Ni decidis kune provi ion por “praktiki” kaj “konigi” la lingvon en nia kvartalo. Ni elektis kafejon kaj daton, kaj poste gluis afiŝojn kaj dissendis mesaĝojn tra la reto por diskonigi la rendevuon.

En la unua rendevuo en majo kunvenis dudek personoj el diversaj kvartaloj de la urbo, lernantoj, parolantoj aŭ nur scivolemuloj. Ni decidis denove kunveni la 3an de junio.

Bela sukceso por la dua kafeja rendevuo *Café Espéranto* — ni estis almenaŭ tridek kvin Esperanto-ŝatantoj, kun ĉiaj niveloj de parolantoj: de vera komencinto de antaŭ du aŭ tri tagoj, ĝis spertulino, kiu partoprenis dekojn da internaciaj renkontiĝoj, kaj iom da scivolemuloj; ekzemple, simpatia usonano devene el Jamajko kaj Ĉinio, kiu min demandis franclingve: “Ĉu vi mem kreis tiun lingvon?”

Ni, francparolantoj, pli multe parolis Esperante ol la unuan fojon, ĉar ni ricevis unuafoje “turistojn” — ili estis japana instruistino kaj du junaj usonanoj, kiuj parolas Esperanton, sed tute ne parolas la francan. Rezulto: uzo de internacia Esperanto je “reala situacio”. Tre kontentiga sperto estas konstati: “Ĝi funkcias!”

Ni reorganizos novan rendevuon la 3an de julio kaj poste probable en septembro.

Provu organizi saman aŭ similan agadon en viaj landoj kaj viaj urboj. Se vi estas “malgrandurbanoj”, provu en la plej proksima granda urbo.

**Eric Hamelin**





## Esperanto plijuniĝas en Ĉinio

La 19an de junio en la ĉina urbo Foshan finiĝis kurso de Esperanto en la Altlernejo por Porprofesiaj Studoj. La rezulto estas sufiĉe kontentiga. Kvindeko da junaj gelernantoj entuziasme partoprenis la kurson.

Dank' al la sukceso de la kurso kaj al la granda intereso de la lernantaro lerni la internacian lingvon, ekde septembro duobliĝos la nombro da gelernantoj kiuj partoprenos ĝin. Oni dividos ilin en diversaj grupoj, kelkaj matene kaj kelkaj posttagmeze. Aliaj altlernejoj de la sama urbo deziras okazigi ankaŭ tiun kurson de Esperanto.

Kvankam la lernado de Esperanto estas pli malfacila por la ĉinoj ol por la eŭropanoj, la rezulto estas sufiĉe bona. La lingvon instruis la hispana esperantisto Augusto Casquero, helpata de la loka samideano Liu Weizhuang.

La direktoro de la lernejo, Jim Peng, mem esperantisto, multege kunlaboris, kaj kontaktis aliajn lernejojn, por proponi okazigi tie kurson de Esperanto.

Fine de majo Casquero prelegis pri Esperanto en du altlernejoj por pli ol 500 gelernantoj en ĉiu. La junaj aŭskultantoj entuziasme petis okazigon de la kurso. Oni atendas la decidon de la lernejestroj.

**Augusto Casquero**

## ELTE: Esperanto malaperas...



La Esperanto-fako ĉe la ĉefa Budapeŝta universitato ELTE (Universitato Eötvös Loránd) malaperas. Jam antaŭ kelkaj

jaroj oni ĉesis akcepti studentojn, kaj la lastaj du nun okupiĝas pri siaj diplomlaboroj.

Ekde la jaro 1966 ĉe la Katedro de Ĝenerala kaj Aplikata Lingvistiko de ELTE funkciis altnivela Esperanto-fako. Esperanton oni povis studi ne kiel ĉefan fakon, sed kiel la unuan kromfakon.

Unu el la ĉefaj motoroj de la Esperanto-fako ekde 1966 ĝis sia morto en 1987 estis István Szerdahelyi. En la Budapeŝta Esperanto-fako studis multaj konataj Esperanto-aktivuloj hungariaj sed ankaŭ alilandaj.

Post la falo de komunismo en Hungario falis ankaŭ la prestiĝo de Esperanto kaj la ĝenerala interesiĝo. Samtempe



En malmultaj urboj de la mondo estas tiom da Esperanto-lernemuloj, kiom en Foshan.

la financado de la universitato estis striktigita, kaj antaŭ kelkaj jaroj la akceptado de novaj studentoj por la Esperanto-fako estis ĉesigita.

Dum kelkaj jaroj la nombro da studentoj en ELTE trioniĝis al malpli ol 10 mil, kaj por ŝpari monon oni decidis devige pensiigi preskaŭ ĉiujn instruistojn pli ol 62-jarajn. Inter tiuj estis ankaŭ lekciisto de la Esperanto-fako, Iván Bujdosó.

Lia maldungo signifis ankaŭ, ke la universitato rezignis pri la planoj transformi la malnovan, universitatnivelan Esperanto-fakon en novan, malpli ampleksan lingvoinstruistan programon, kiu tamen ebligus al la studentoj ankaŭ estonte havi kursojn pri Esperanto kiel parton de sia universitata edukado.

En la sama periodo kulminis la interna skismo de la Esperanto-movado en Hungario.

Ĉar la oficiala kialo por la maldungo de la lekciisto estis manko de financado, la usona fondaĵo Esperantic Studies Foundation (ESF) serioze konsideris la eblecon kontribui al la salajrokostoj por konservi la Esperanto-programon ĉe la universitato. La sekcio de aplikata lingvistiko pozitive sintenis al la propono pri financa subteno, kaj printempe de la jaro 2007 Humphrey Tonkin kiel reprezentanto de ESF vizitis la universitaton por diskuti la praktikajn detalojn. Tamen la dekano de la katedro tute rifuzis renkonti lin, kaj la rektoro de la universitato ne konsentis subskribi kontraktan pri la financa subteno.

— La trista fakto estas, ke ni estas la lastaj studentoj, ĉar la “kara” dekano decidis, ke la fakto ĉesu la funkciadon. Verdire ni ofte sentas, ke ni estas superflua malgravaĵoj en la okuloj de la universitata burokratio, — skribis unu el la studentoj lastatempe en diskutlisto de hungariaj esperantistoj.

Laŭ *Ret-Info*

## Jarlibro 2009 aperis

Portreto de D-ro Zamenhof malfermas la ĉi-jaran *Jarlibron de UEA* omaĝe al lia 150a datreveno. En la antaŭparolo Barbara Pietrzak, la ĝenerala sekretario de UEA, traktas la aktualecon de la ideoj de Zamenhof kaj tiujn de la Manifesto de Prago, kies teksto aperas apud la Esperanto-rezolucioj de Unesko.

Kun 1735 adresoj en 102 landoj la *Jarlibro* havas precize same multe da delegitoj kiel en 2008. Estas 52 ĉefdelegitoj, 965 lokaj delegitoj, 106 vicdelegitoj, 35 junularaj kaj 1309 fakaj delegitoj. Krome en Brazilo estas 5 regionaj delegitoj. La fakdelegitoj reprezentas preskaŭ 800 fakojn. En la unua parto, eldonita ankaŭ aparte kiel *Gvidlibro 2009*, aperas adresoj k.a. informoj pri la organoj, instancoj kaj servoj de UEA kaj TEJO, pri landaj kaj fakaj asocioj, akademioj, edukaj kaj kulturaj instancoj, bibliotekoj, ktp.

Individuaj membroj de UEA povas profiti de la informo trezoro de la *Jarlibro* ankaŭ rete. Krom facila uzebleco por rapida serĉo de delegitoj k.a. informoj, avantaĝo de la reta *Jarlibro* estas ĝia ĝisdateco. Pere de ĝi eblas krome sendi retmesaĝojn al delegitoj kaj akiri por si plusendan retadreson kun la finaĵo @uea.org. Uzantoj de la reta *Jarlibro*, kies kotizo rajtigas ricevi la revuojn *Esperanto* aŭ *Kontakto*, povas legi ilin rete jam, kiam ili estas presataj. Por uzi la servon necesas registriĝi ĉe <http://reto.uea.org>. Fine de majo tiu ĉi servo havis 2120 uzantojn.

**GK UEA**

### 91-a Brita Kongreso de Esperanto

*Llandudno, Kimrio, Britio*  
14-17 de majo 2010

<http://www.esperantollandudno2010.org.uk>

## Unufraze

★ Je 20 jun al la 94a UK en Bjalistoko aliĝis 1739 personoj el 61 landoj; plej multaj aliĝoj estas el: Pollando 296, Francio 237, Japanio 176, Germanio 134, Nederlando 66, Italio 61, Ruslando 60, Brazilo 57, Belgio 46, Ĉeĥio 46, Litovio 43. (uea.org)

★ Kataluna E-Asocio aliĝis al tri iniciatoj: al la kultura asocio Joan Amades por omaĝi ĉi tiun faman folkloriston k esperantiston, al la iniciato por instigi la Aragonan parlamenton akcepti lingvoleĝon de Aragono, k al la asocia grupo *Ni lumigu la maron* de la kvartalo Ribera en Barcelono. (Kataluna Esperantisto)

★ En la urbo Alvorada (Brazilo) la urbestro João Carlos Brum akceptis decidon pri atribuo de la nomo *Idioma Esperanto* al strato en la kvartalo Jardim Alvorada. (BEL informas)

★ 5 maj okazis prezento pri Eo en la Filozofia Fakultato de la universitato UNISAL en Lorena, ŝtato San-Paŭlo, Brazilo. (BEL informas)

★ 4 jun en festivalo de la Majorka universitato, kadre de poezia vespero, en plenplena teatro Abel Montagut prezentis dupaĝan fragmenton el sia *Poemo de Utmoa* en Eo. (Libera Folio)

★ Itala E-Federacio lanĉis kampanjon por donaci librojn pri Eo al bibliotekoj pretaj akcepti ilin; al entute 109 bibliotekoj estas donacitaj 86 lernolibroj de Migliorini, 107 vortaroj de Corsetti-Vessella, 106 libroj de Janton *Esperanto: lingua, literatura, movimento* k.a. (Informitale)

★ 18 jun aperis preskaŭ duonpaĝa artikolo pri Eo en la centra hungara tagĵurnalo *Népszabadság*, havanta la plej grandan eldonkvanton inter novaĝgazetoj en Hungario. (Szilvási László)

★ Komence de la jaro Johan Derks k Svetlana Milanović (Nederlando) faris kvarsemajnan instruvojaĝon en Burundio, en kiu ili instruis Eon al 80 komencantoj k al 35 progresantoj. (Esperanto)

★ Nur 598 membroj de SAT pagis siajn membrokotizojn por la jaro 2008; krome SAT havas 209 “ŝvebantajn membrojn” kiuj ne pagas kotizojn, sed tamen ricevas *Sennaciulon*; la plej granda laborista E-organizo, SAT-Amikaro en Francio, havas 688 membrojn. (Sennaciulo)

★ 16 jun la litovia grupo *Asorti* koncertis antaŭ pli ol tridek e-istoj en la Tel-Aviva E-klubo. (Landa Agado)

## Ekzameniĝu Eŭrope

En la sekvaj monatoj okazos pluraj sesioj de la novtipa ekzamsistemo de UEA kaj la Ŝtata Lingvoekzamena Centro (ITK) el Budapeŝto. La plej proksimaj sesioj okazos dum la 65a IJK (Liberrec, Ĉeĥio; 20–21 jul), 94a UK (Bjalistoko, Pollando; 30 jul) kaj ARKONES (Poznano, Pollando; 18–20 sep). Plena listo kun datoj kaj la okazigotaj niveloj, kaj kun elŝutebla aliĝilo troviĝas en <http://www.edukado.net/pagina/Sesioj+-+Aliĝo/22425//>

Interesitoj bv. kontakti la indikitajn personojn kaj elŝuti aŭ peti aliĝformularon kiel eble plej frue.

La ekzamenoj estas ellaboritaj laŭ la Eŭropa Referenckadro je tri niveloj (B1, B2 kaj C1). La postuloj de la unuopaj niveloj troviĝas en

<http://www.edukado.net/pagina/REFERENCKADRO/18364/#19864>

Respondante al la normoj de la eŭropa sistemo la ekzamenoj ne havas tradukan parton kaj dum ili oni ne kontrolas movadajn kaj kulturajn konojn pri Esperanto. Eblas fari la du partojn (skriban kaj buŝan) ankaŭ aparte en diversaj lokoj kaj periodoj, kaj ricevi apartajn atestilojn pri ili. Por atestilo pri kompleta ekzameno necesas sukcesaj rezultoj en ambaŭ partoj de la koncerna nivelo.

GK UEA

## Kroataj gelernantoj konkuras

La okan jaron sinsekve okazas konkurso por lernantoj de Esperanto en Kroatio. Ĉi-jara konkurso okazis dum tri tagoj en majo, en skolta restadejo *Esperanto Domo* en Kostrena, ĉemara urbeto apud Rijeka. La konkurson partoprenis 23 infanoj el ok elementaj kaj du mezaj lernejoj.

La gelernantoj faris skriban ekzamenon kaj konkursis en tri kategorioj: A komencantoj, B supera nivelo, kaj C eseoj.



La ekzameno en Kostrena (Fotis Boris Di Costanzo)

La unuan premion en la kategorio A ricevis Anamarija Haramina el la elementa lernejo *Mladost* (Zagrebo); en la kategorio B — Dorotea Martinec el *Mladost*, kaj en la kategorio C — Nikolina Gegić el la elementa lernejo *Retkovec* (Zagrebo). Per *Pokalo Kostrena 2009* estas premiita la Zagreba elementa lernejo *Mladost*, kiel la plej bona lernejo.

La plej sukcesaj lernantoj (la unuaj tri lokoj) estis premiitaj per diplomoj kaj pokaloj. Ĉiuj lernantoj ricevis donace la libron en Esperanto *La infanoj en la arboj* de Gudrun Pausewang. Konkurantoj ankaŭ povis, kune kun prelegantoj kaj aliaj ĉeestantaj gastoj, ĝui maran etoson, viziti groton Vrelo en Fužine (Gorski Kotar), kaj etnografian ekspozicion en Lič.

Krom la konkurso kaj ekskurso, okazis ankaŭ jara rekontiĝo de prelegantoj de Esperanto.

Tea Radovanović

## Omaĝe al profesoro Kim Samsoo

La 9an de majo okazis la 11a Tago de Pioniro en Eundeok Ŝonbulismo-Kulturcentro, Seulo. Ĉi-jare la Korea Esperanto-Asocio (KEA) dediĉis la tagon al rememoro pri Kim Samsoo (1919–1985), kiu estis profesoro pri ekonomiko en la virina universitato Sookmyung. Kunestis 55 homoj inkluzive de ok familianoj de la pioniro.

Kim Samsoo eklernis Esperanton sub gvido de prof. Hong Heng-wi en la kolegio Cheonggu (Daegu) en 1956. Li estis vicprezidanto de KEA (1975–79, 1982–85) kaj ĉefredaktoro de *La Lanterno Azia* (1983–84). Li, kiu partoprenis en la 43a UK en Mainz, 1958, estas la unua koreo en la UK-historio. Li eldonis la libron *Historio de Korea Esperanto-Movado* (Sookmyung-Universitato, 1976).

Je la festo KEA publikigis la memorlibron *Historio de Korea Esperanto-Movado kaj d-ro Kim Samsoo*, kiun kompilis s-ino Cho Myoung-ja. La libro enhavas resuman biografion de la pioniro; artikolojn, kiujn la profesoro verkis pri aŭ en Esperanto; kaj rememoraĵojn pri li kontribuitajn de liaj posteuloj kaj familianoj.

Prezidanto de KEA, Park Wha-Chong, dankis ne nur la kompilanton kaj tiujn, kiuj kunlaboris por kompilado de la memorlibro, sed ankaŭ la familianojn de Kim Samsoo kaj KEA-membrojn, kiuj finance subtenis por eldoni ĝin.

Kim Uson





Ekde sia apero, komputiloj iĝas uzataj en pli kaj pli da kampoj de homa aktivado, kaj ekde la apero de Interreto, ili iĝis ĉefa teknika ilo ankaŭ por interhoma komunikado. Dank' al ili, internacia komunikado iĝis pli facila kaj rapida ol iam ajn, kaj homoj havas pli kaj pli da kontaktoj kun personoj el aliaj landoj, parolantaj aliajn lingvojn. Ni en E@I kutimas diri ke Interreto forigas la fizikan distancon inter homoj, kaj Esperanto forigas la lingvan, sed atingi tiel altan nivelon en Esperanto ke oni apenaŭ faras erarojn tamen daŭras. Tial ni ekrevis pri altnivela gramatikkontrolilo por Esperanto kiu:

- atentigus komencantojn pri verŝajnaj eraroj, ne nur literumaj, sed ankaŭ gramatikaj;
- donus ŝanĝoproponojn, ordigitajn laŭ verŝajneco;
- helpus ankaŭ al spertaj Esperantistoj per “kontrollegado” de longaj dokumentoj;
- donus pedagogiajn komentojn pri la eraroj, kun ligilo al pli detalaj klarigoj kaj lernomaterialo.

Tio estas ambicia revo eĉ por grandaj komercaj institucioj kun multege da rimedoj, perkompuita lingvotraktado laŭ pluraj eniras kampon de artefarita intelekto kaj malgraŭ jardekoj da klopodoj oni ankoraŭ ne sukcesis atingi perfektan rezulton por ajna lingvo, sed ni decidis provi. La teamo gvidata de Eckhard Bick, profesia komputilingvisto el Danujo/Germanujo kaj kunkreinto de gramatikkontrolilo por la dana kaj de sintaksanaliziloj k.a. por pluraj aliaj lingvoj, kun financa subteno de ESF eklaboris pri lingvohelpilo\* por Esperanto komence de 2008. Ekde majo 2009 la rezulto testebblas kaj uzebblas ĉe <http://beta.visl.sdu.dk/lingvohelpilo/>.

Temas pri prototipa versio, kiu celas komencintojn kaj progresintojn, kiuj faras ne pli ol unu gramatikan eraron en dek vortoj. La uzata tekniko estas KuntekstGramatiko (Constraint Grammar en la angla), kaj la plano estas iom post iom plibonigi ĝin, tiel ke ĝi uzoblu ankaŭ de pli larĝa celgrupo, kaj integri ĝin i.a. kun retumilo *Fajrovulpo* kaj kurskorespondado, retbabilejo, forumoj kaj mesaĝisistemo de *lernu!*

La projekto bonvenigas ĉiaspecan helpon — eblas kontribui per testado, erarekzemplokolektado, pri aspektigado, programado aŭ finance. Pli da informoj troveblas ĉe <http://lingvohelpilo.ikso.net/kunlaborebloj.html>. Antaŭdankon!

**Sonja Petrović Lundberg**

\* La projekto estas nomata *Lingvohelpilo* ĉar ĝi ne nur kontrolas literumadon kaj gramatikon, sed ankaŭ donas veran lingvan helpon en formo de korektproponoj, pedagogiaj klarigoj kaj ligiloj al instrumaterialo kun pli da informoj kaj ekzercoj.



## Nova projekto: Enciklopedio

*Enciklopedio de Esperanto. Ruslando. 1887–2010* estas preparota. La historia komisiono de REU kolektas informojn pri personoj, eventoj, objektoj, eldonaĵoj kaj ceteraj faktoj, ligitaj al Esperanto kaj Esperanto-movado en Ruslando. Ankaŭ bonvenas analizaj artikoloj pri Esperanto-kulturo. Oni rajtas ĉerpi informojn el la plej diversaj fontoj: Interreto, enciklopedioj eldonitaj en kaj ekster Ruslando. Certe, oni ne rajtas rompi la aŭtorrajtojn de la citataj verkintoj.



La historia komisiono de REU invitas al la kunlaboro vastajn rondojn de enlandaj kaj eksterlandaj esperantistoj. De viaj kontribuoj dependos riĉeco kaj objektiveco de la onta *Enciklopedio*.

Al la volontuloj estos senditaj:

a) listo de la artikoloj, pri kiuj jam estas kolektitaj informoj;

b) listo de verkindaj artikoloj.

Skribu al la komisiito pri historio, Anatolo Sidorov:

✉ 192242, Sankt-Peterburg, str. Belgradskaja, 10-3-27, Ruslando;

✉ [anasido@gmail.com](mailto:anasido@gmail.com)

**Anatolo Sidorov**

## Reage al *La galega lingvo minacata*

Mi estas galego jam 80-jara, ideologie socialisma. Miaj denaskaj lingvoj estas la galega kaj la kastilia (t.e., la antonomazie hispana), kaj pri ambaj egale bone kompetentas parole kaj skribe. Pro familiaj kauzoj mi jam de ses jaroj loĝhas malproksime de Galegio.

Che ekapero de la shovinismaj prilingvaj leĝoj venantaj de tiuj kiuj audacas stulte kaj antisocie sin nomi galegistoj, mi devigis min mem ne plu uzi la galegan tiom longe kiom la afero ne venos sur justan kaj ghustan vojon, kaj tenadas mian decidon. Mi ankore atendas ke la nova kaj dekstrisma galega registaro plenumu sian promeson reghustigi la misfaradon de shovinistoj, tiel ke mi sentu min rajtigita ree libere spiri, paroli kaj skribi anke en la sino de mia amata galega, ne nur en la sino de mia egale amata hispana.

**Antonio Alonso Núñez**

Petite de la aŭtoro ni konservis senŝanĝa lian ortografion.

La 30an de majo forpasis la eminenta brazila esperantisto  
**Sylla Chaves (1929–2009)**

Li studis juron, komunikadon, kibernetikon kaj politikan sciencon. Li laboris ĉe UN en Novjorko kaj Unesko en Parizo kaj profesoris en la Brazila Lernejo pri Publika Administrado. Lerninte Esperanton en la 1930-aj jaroj, li ekaktivis en 1946. Prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo (1978-82), membro de la Akademio de Esperanto (1986-96), Honora Membro de UEA (1992). Li verkis multajn lernilojn kaj du poemarojn *Animo prisma* (1959) kaj *Por pli bona mondo* (1970).



# La fera kurteno revenis

de Kalle Kniivilä

La trajno el la Ruslanda Kaliningrado al Gomel en Belorusio proksimiĝas al Fortikaĵo Eŭropo. Estas varme, malforta ŝvitodoro sentiĝas en la aero.

Striaj matracoj, mallarĝaj kuŝbretoj. La buntaj belorusaj littukoj estas inkluzivitaj en la prezo de la bileto. La pasaĝeroj en la kuŝvagono kun malfermaj kupeoj fosas en siaj valizoj. La vizokontrolo proksimiĝas.

La plej multaj estas virinoj, pli ol mezaĝaj, plej ofte oni veturas por viziti parencojn. Komercistoj ne vojaĝas per trajno, kaj absolute ne en la nekostaj malfermitaj kupeoj. En ĉi tiu vagono neniu eliros en la teritorio de Eŭropa Unio, ĉiuj plu-veturos al Belorusio.

Jelena Nesterova ĵus vizitis sian 80-jaran patrinnon, kiu rompis sian femuroston. La patrino loĝas en Kaliningrado, ŝi mem loĝas en Belorusio, proksime al Minsko.

— Eble estas la lasta vivojaro de panjo. Mi volus viziti ŝin ĉiumonate. Sed ne eblas. Oni ne ricevas transitan vizon por pli ol unu fojo, tion oni diras en la ambasado.

Kiam ŝia patrino estis enhospitaligita en Kaliningrado, Jelena Nesterova tuj stariĝis en la vico por ricevi Litovian transitvizon.

Pasis semajno antaŭ ol ŝi rajtis lasi sian peton en la ambasado de Litovio en Minsko. Dek tagoj por pretigi la vizon. Sed plej malbone estis pri la prezo. Sesdek eŭrojn kostas la rajto veturi kelkdek kilometrojn tra la Ŝengena regiono per trajno. Unu fojon tien, unu fojon reen. Poste la vizo estos finuzita.

— Tio estas terure multe da mono por mi. Kostas pli ol la trajnbileto.

Virino sur alia flanko de la trajnkoridoro ne plu povas silenti:

— Por kio utilas tiu via Eŭropa Unio? Ĝi nur ĝenas!

Antaŭ unu kaj duona jaroj ankaŭ Pollando kaj Litovio iĝis plenrajtaj membroj de la granda EU-familio: ili aliĝis al la Ŝengena regiono, kune kun sep pliaj landoj.

Ĉiuj limkontroloj estis forigitaj. Sidiĝu en vian aŭton kaj veturu el Vilno ĝis la plej okcidenta punkto de kontinenta Eŭropo, Cabo da Roca en Portugalio. La distanco estas 3 mil 769 kilometroj, neniu kontrolos vin.

Sed samtempe kiam la limoj ene de EU malaperas, la muroj kontraŭ la najbaroj en la oriento iĝas ĉiam pli altaj. Ne gravas, kion opinias la rusoj kaj la belorusoj — ili ne estas membroj de la EU-klubo.

Plej enfermitaj estas la loĝantoj de Kaliningrado, peco de Ruslando, kiu ekde la komenco de la pasinta jaro estas komplete enfermita de la ekstera limo de EU.

Antaŭe estis facile por la Kaliningradanoj veturi al la najbaraj landoj. Nun ĉiam pli multaj busoj estas forstrekataj el la horaro pro manko de pasaĝeroj. La trajnoj iĝas pli mallongaj. Iĝis koste kaj komplike havigi vizojn.

Héctor Cala laboras en bovlinga drinkejo en Kaliningrado. Li ne bezonas al kutimiĝi al la sento de enfermiteco. Li naskiĝis kaj kreskis en Kubo. Unu el la malmultaj manieroj forveturi de tie en la 1980aj jaroj estis ekstudi en Sovetio.

Sovetio finiĝis proksimume samtempe kun la studoj de Héctor Cala en Moskvo, kaj li pripensis resti tie. Sed lia patro estis fidela komunisto. La filo veturu reen kaj konstruu komunismon.

— Mi reveturis kaj loĝis tie sep jarojn. Sed mi ne eltenis la neliberecon kaj malriĉecon. Post la morto de mia patro mi decidis reveturi al Ruslando, ĉi tie estas multe pli libere.

Unue Moskvo, poste oni proponis laboron en Kuba restoracio en Kaliningrado. Li edziĝis al rusa virino. Nun la paro havas kvarjaran filon. La loĝejo estas malgranda kaj la aŭto estas aĝa, sed Héctor Cala estas kontenta pri la vivo.

— Ĉi tie estas bone, pli trankvile ol en Moskvo, kaj ĉiuj vizitantoj diras, ke estas pli eŭropece ĉi tie. Sed mem mi ne povas veturi ien ajn, mi eĉ ne povas trajni al Moskvo. Se mi volas tien, mi devas flugi.

Por posedanto de Kuba pasporto apenaŭ indas peti Ŝengen vizon. Nun Héctor Cala esperas, ke li baldaŭ povos iĝi Ruslanda civitano.

— Kun Ruslanda pasporto estas iom pli facile vojaĝi.

La ĉefstrato de Kaliningrado plu nomiĝas Leninskij prospekt. La granda statuo de Lenin, kiu staris sur la Placo de la Venko antaŭ la urbodomo, estas forportita. La placon nun regas nova preĝejo kun ora kupolo — kaj kvar brilaj aĉetcentroj.

La trafiko estas surdiga, kaj ĉiuj aŭtoj estas de eksterlandaj markoj. Oni devas gvati longe por trafi malnovan aŭton, fabrikitan en Ruslando. En la luksaj vendejoj preskaŭ ĉiuj varoj estas importitaj. Pli facilas porti varojn de trans la EU-limo ol el la cetera Ruslando.

Kaliningrado estas ĉirkaŭita de la limo, sed samtempe la urbo kaj la tuta gubernio grandparte vivtenas sin per translima komerco. Favoraj Ruslandaj impostreguloj faciligas la importadon de ĉio ajn al Kaliningrado. Sed oni rajtas plueksporti la varojn al la cetera Ruslando nur, se ili unue estas prilaboritaj en Kaliningrado. Tial en Kaliningrado estas dekoj da fabrikoj kiuj kunmetas aŭtojn kaj televidilojn, aŭ fabrikas kolbason el importita viando.



La propra kultivebla tero en Kaliningrado grandparte restas neuzata. La Sovetiaj kolektivaj bienoj kolapsis; pro la burokratio estas malfacile fondi propran bienon; kaj krome la konkurado estas forta. Multe pli simplas importi lakton el Litovio ol starigi propran produktadon de lakto.

La familio Jefremov en la vilaĝeto Klenovoje ĉiukaze provas. Ili sukcesis aĉeti kaj rekonstrui malnovan, negrandan germanan domon en sia hejma vilaĝo. Poste ili vendis unu el la du aŭtoj de la familio, por aĉeti uzitan Belorusian traktoron.

La du bovinojn ili ĉefe havas por propraj bezonoj. Sur sia parceleto ili kultivas terpomojn kaj brasikojn por vendado. La aĉetantoj iĝis iom pli multaj nun, pro la falinta kurzo de la rublo la importitaj manĝaĵoj plikostiĝis.

— Krome ni havas tridek ses ŝafojn kaj ses ĉevalojn. La ĉevalojn ni havas por ke urbanoj povu veni ĉi tien rajdi, — rakontas Natalija Jefremova.

La malgranda bieno ne sufiĉas kiel sola fonto de enspezoj. Ĝis antaŭ kvar jaroj Natalija Jefremova laboris en la sola sukcen-minejo de la mondo, en la najbara vilaĝo. Tie ŝi poluris la pecojn de fosilia rezino kaj fabrikis el ili ornamaĵojn.

Kiam la minejo maldungis grandan parton de la personaro ŝi anstataŭe eklaboris en municipa oficejo. Ŝia edzo Nikolaj Jefremov plu laboras kiel fosmaŝinisto en la sukkena minejo.

— La krizon oni kompreneble sentas ankaŭ tie, — rakontas Nikolaj. Pasintjare li gajnis pli ol mil eŭrojn monate: bona salajro en la Ruslanda kamparo. Nun la enspezo estas malpli ol duono de tio.

— Pleje mi ŝatus maldungiĝi tie, kaj labori nur sur mia propra tero, sed maleblas aĉeti teron por kultivado je akceptebla prezo.

Ĝis la jaro 2007 la familio Jefremov feris en Pollando ĉiujare. Post kiam la najbaraj landoj aliĝis al la Ŝengena regiono, ili ne plu estis eksterlande. Estas tro koste, kaj tro komplike.

Tamen la mondo venis pli proksimen al la vilaĝo Klenovoje, kie estas nur dek tri domoj. Nova, oranĝkolora telefon-aŭtomato staras ĉe la ĉefa vojo. Ĝi estas konektita al nova, cifereca centralo. Nun ĉiuj dezirantoj povas havigi rapidan ligan al la reto.

— Sed ni ne havas komputilon. Niaj filinoj loĝas en la urbo, ili scias uzi la reton, — diras Natalija Jefremova.

Denove en la trajno, ĉe la limo de la Ruslanda Kaliningrado kaj Ŝengena Litovio. La Ruslandaj limsoldatoj atente inspektas niajn Svediajn pasportojn. Ĉiun paĝon ili kontrolas per lupeo. La Ruslanda drogohundo estas malgranda, bruna kaj dolĉa. Ĝin gvidas iom ronda, ridetanta virino en uniformo. La trajno staras kvindek minutojn ĉe la stacio Nesterov sur la Ruslanda flanko.

Denove ni veturas tra la nokto. La limon markas longa vico da fortaj lampoj, direktitaj al Ruslando. Ĉe la sekva stacio la ŝildo havas latinajn literojn. Kybartai. Jen komenciĝas Ŝengenlando kaj Eŭropa Unio.

La Litovia drogohundo estas granda, nigra, kaj tute ne dolĉa. Ĝin gvidas viro, kiu ne ridetas. Poste aperas la Litovia paskontrolisto. Li rapide okulumas niajn vinruĝajn Eŭropasportojn. Li havas neniun lupeon, sed ja modernan, malgrandan komputileton, kiu pendas sur lia ventro.

Jelena Nesterova, kiu vizitis sian 80-jaran patriron en Kaliningrado, ne estas imponita.

— Kial ni vicitendu kaj pagu amason da mono nur por spiri litovian aeron, kiam ni traveturas ĉi tie?

## Literatura konkurso Liro-2009

**La Ondo de Esperanto** denove invitas ĉiujn dezirantojn partopreni en la tradicia literatura konkurso *Liro-2009*. Ĉi-jare la organizanto proponas tri originalajn branĉojn:

1. Originala prozo
2. Originala poezio
3. Recenzo de la romano *Serpentoj en la puto* de István Nemere (Kaliningrado: Sezonoj, 2009).

En la 1a kaj 2a branĉoj oni rajtas partopreni per ne pli ol tri verkoj, en la 3a branĉo — nur per unu verko.

Sendu kvar tajpitajn, komputile kompostitajn aŭ klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de *Liro*, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando). La konkursaĵoj devos atingi la sekretarion antaŭ la 1a de decembro 2009.

Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso.

Oni povas sendi la tekstojn kaj slipojn rete, en apartaj mesaĝoj, al la adreso [sezonoj@yahoo.com](mailto:sezonoj@yahoo.com). Oni ne rajtas sendi verkojn, kiuj estis publikigitaj aŭ premiitaj en aliaj konkursoj.

La laŭreatoj ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La organizanto ĝis 1 jan 2012 havos la ekskluzivan rajton de la unua publikigo de la ricevitaj konkursaĵoj en *La Ondo de Esperanto* kaj elektronike. La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, kiu konsentas cedi ĝin senpage al la organizanto en okazo de libroforma eldono.

## La 12a Internacia Fotokonkurso

**Post dek unu sukcesaj konkursoj (1998–2008) la redakcio de La Ondo de Esperanto** invitas al partopreno en la **12a Internacia Fotokonkurso**.

Rajtas partopreni ĉiu fotemulo amatora aŭ profesia, sendepende de la loĝlando kaj lingvokono. Unu persono rajtas partopreni per maksimume kvin fotoj. La minimuma formato estas 15×20 cm. Fotoj povas esti koloraj aŭ nigra-blankaj, vertikalaj, horizontalaj kaj aliformataj. Fotoj, senditaj elektronike, ne estas akceptataj.

La konkursaj fotoj devas esti senditaj al la sekretario de la konkurso, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando). La fotoj devos atingi la sekretarion de la konkurso antaŭ la 1a de decembro 2009.

La konkursaĵoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. En aparta koverto kunsendata devas esti slipo kun la pseŭdonimo, aŭtenta nomo, poŝta adreso kaj retadreso (se estas) de la aŭtoro. Oni povas aldoni titolon aŭ klarigan noton al la fotoj, sed tio ne estas deviga. En la konkurso ne rajtas partopreni fotoj jam premiitaj aŭ publikigitaj.

Juĝkomisiono aljuĝos premiojn al la laŭreatoj:

1. 50 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto* en 2010.
2. 25 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto* en 2010.
3. abono de *La Ondo de Esperanto* en 2010.

Speciala premio (50 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto*) por la plej bona foto pri la temo *Infanoj*.

Ĉiu premiito ricevos diplomon. La rezulto estos anoncita en *La Ondo de Esperanto*. La organizanto de la konkurso havos ĝis la 31a de decembro 2011 ekskluzivan rajton uzi la ricevitajn fotojn en papera kaj elektronika formo kaj en ekspozicioj. Poste la publikigo-raĵton havos kaj la organizanto kaj la aŭtoroj.



# Zamenhofoj survoje al Bjalistoko kaj en la urbo

*de Zbigniew Romaniuk*

La plej malnova certigita devenloko de la familio Zamenhof estas la urbo Suwałki, ĝis nun neniam ligata kun Zamenhofoj. Tie ili loĝis almenaŭ ekde 1836. Ĉi tie la 27an de januaro 1837 naskiĝis Motel, kiel oni skribis en la naskiĝatestilo, aŭ Mordĥe (Mordeĥaj), kiu post longa tempo nomis sin Marko. Liaj gepatroj estis: la 30-jara Fajba Volfoviĉ Zamenhof kaj la 28-jara Rajna Percovna.

La retrovita dokumento kontraŭas la ĝisnunajn, kutime ripetatajn informojn, laŭ kiuj Marko Zamenhof naskiĝis en Tykocin.

En Suwałki naskiĝis ankoraŭ du fratinoj de Motel, aŭ Mordeĥaj, aŭ Marko. En 1839 naskiĝis Rivka (Rebeka). Ĉi-foje menciita estis ankaŭ okupiĝo de ŝia patro Fajvel — “revendisto”, t.e.: malgrava komercisto, budo-vendisto aŭ surstrata vendisto. En 1843 en Suwałki naskiĝis ankoraŭ unu fratino de Mordĥe — Perla. Ankaŭ ĉi-foje Fajvel estas menciita kiel “revendisto”.

Ĉi-supraj naskiĝatestiloj ebligas sufiĉe precize difini la naskiĝjarojn de Fajvel, filo de Volf — kiel 1806 (certe ne post 1807) kaj de Rajna, filino de Perc — kiel 1810 (certe ne antaŭ 1809). Inter la konservitaj kaj ĝis nun konataj ŝtataj geedziĝaj dokumentoj oni ne trovis ilian geedziĝan atestilon. Laŭ nerektaj indikoj tio povis okazi ĉirkaŭ 1833. Tiuj ĉi nekonataj dokumentoj estas ĝis nun la plej malnovaj aktoj ligitaj kun la familio Zamenhof. Konkludo laŭ ili estas, ke Zamenhofoj venis al Suwałki antaŭ januaro 1837 kaj foriris el la urbo post julio 1843.

Nerespondita restas la jena demando: kio okazis al Zamenhofoj inter 1843 kaj 1853? Oni povas nur konjekti, ke

post 1843 ili dum ankoraŭ kelka tempo loĝis en Suwałki kaj rekte — aŭ “haltante” en iu alia urbo — ili venis al Tykocin, en kiu aperas sekva spuro en la jaro 1853.

Nelonge antaŭ aŭ precize en la jaro 1852 Zamenhofoj transloĝiĝis al Tykocin, urbeto ĉe la rivero Narew, okcidente de Bjalistoko. La plej malnova atesto pri restado de Zamenhofoj en Tykocin estas la informo, ke en decembro 1853 en tiuloka sinagogo estis legita anonco pri geedziĝa ceremonio inter la vidvo Aron Froimoviĉ Szwarcenberg el Łomża kaj la fraŭlino Peŝka Fajvelovna Zamenhof el Tykocin, loĝanta ĉe la gepatroj. Tiu Peŝka estis onklino de Ludoviko Zamenhof. La dokumento mencias ankaŭ Fabian-on (Fajvel), kiu akceptis la edziniĝon de sia filino al la vidvo Szwarcenberg (Schwartzenberg). La religia nupta ceremonio okazis en printempo 1854 en sinagogo en Łomża. En ĉi tiu urbo Aron Szwarcenberg vivtenis sin instruante judajn infanojn. En la nupta atestilo oni notis, ke Peŝka sciopovis skribi nek pole, nek hebree, nek jide. Tio estis tipa ĉe provincaj judaj virinoj de tiu periodo. La supra informo estas grava spuro en la historio de la familio.

La instruisto Szwarcenberg verŝajne influis klerigon de sia juna bofrato Mordeĥaj (Marko). Eble li sugestis al Marko elekti postan vivovoĵon. Aron estris unue lernejon por judaj infanoj en Varsovio kaj poste en Łomża. Post jaroj li revenis kun la edzino al Varsovio.

Fajvel-Fabian kun la filo Josel Volf okupiĝis pri komerco. La pli juna filo Mordĥe lernis kun talento, finis iun laikan mezlernejon kaj eventuale sukcesis pasigi eksterlernejan ekzamenon, kiu

ebligis pluan studadon en universitato. Oni supozas, ke li komencis studi pedagogion en Moskvo.

Aliaj mencioj, kiuj certigas registron de Zamenhofoj al la juda komunumo en Tykocin, devenas de libroj pri naskiĝoj, geedziĝoj kaj mortoj, preparitaj en Bjalistoko en la jaroj 1858–1866. Estas konate, ke dum tiuj jaroj ili loĝis en Bjalistoko, sed en la dokumentoj oni skribis ilian formalan registriĝlokon: “el la urbo Tykocin”.

Zamenhofoj venis al Bjalistoko, la urbo ĉe la rivero Biała, probable en 1857, ĉar en januaro de la sekva jaro ili jam estas tie menciitaj. Ĝis 1866 tamen oni raportadis daŭre ilian formalan membrecon en la komunumo Tykocin.

Zamenhofoj loĝis en mizera juda kvartalo, en domo ĉe la strato Verda, ĉe angulo kun la strato Blanka. En la troloĝata urbo estis malfacile trovi loĝejon, kaj pro tio multaj domoj havis diversajn alkonstruaĵojn kaj kromkonstruitajn etaĝojn. Luado kaj vendado de loĝejoj populariĝis. Al la tipa domo, staranta fronte apud la strato Verda, oni alkonstruis ankaŭ du konstruaĵvicojn funde de la korto. En la lasta vico en la etaĝo, kiu atingebliis per kruta kaj kovrita ŝtuparo, ekloĝis Zamenhofoj. Ili okupis tri malgrandajn ĉambrojn luatajn de la judo Ciechanowski.

Fajvel, la familiestro, vivtenanta la familion per komerco, estis jam verŝajne malsana. Oni scias, ke en Bjalistoko lian mongajnan profesion de li transprenis lia filo, Josel Volf. Verŝajne en 1857 li edziĝis al Sora Ickovna Wiernicka. Post kelka tempo ili ekloĝis en domo ekster la strato Verda. En januaro 1858 naskiĝis en Bjalistoko ilia filino Ĥajka, kaj la sekvan jaron — la filino



Elena. Poste aperis ankoraŭ ses infanoj. Inter ili precipe gravas, pro simileco de nomoj kaj aĝoj, noti la filon Lazaro (Lejzer) — je dek monatoj pli junan ol Lazaro-Ludoviko, la kreinto de Esperanto. Ankaŭ tiu ĉi Lazarj Joseleviĉ, kuzo de Ludoviko kaj filo de lia onklo, lernis en la Bjalistoka gimnazio. Dum sia junaĝo li forlasis la lernejon kaj fuĝis al Grodno, kie li volis iĝi ortodoksa kristano. Poste li elmigris al Kanado. Tie, sub la nomo Louis Samenhof, li estis reprezentanto de firmao vendanta tabakon.

En 1858, aŭ komence de 1859, Mordĥe-Marko edziĝis al fraŭlino Liba Roĥla, filino de Ŝolom Sofer. Ilia unua filo, Ludoviko Zamenhof, naskiĝis la 15an de decembro 1859 en la etaĝo de la antaŭe priskribita ligna domo ĉe la Verda strato, troviĝanta ne pli ol ducent metrojn for de la foirplaco.

Baldaŭ post la naskiĝo de Ludoviko, en junio 1860, edziniĝis lia onklino — Rivka Fajvelovna Zamenhof. Kiel edzon oni elektis al ŝi Bunem aŭ Benjamin Fridman el Bjalistoko. Malgaja etoso aperis en la domo de Zamenhofoj la 28an de marto 1861. Pro ne precize konata malsano mortis la nestoro de la familio, Fajvel Volfoviĉ Zamenov (aŭ Zamenhof).

Marko Zamenhof laboris ĝis prin-tempo 1862 kiel librotenisto kaj privata instruisto de infanoj en la riĉa familio Zabłudowski. Baldaŭ, kune kun aliaj instruistoj, li establis duklasan lernejon por knabinoj “Tora ba derech Erec”. Krom la Malnova Testamento, la principoj de la hebrea religio kaj la hebrea lingvo, tie estis instruataj ankaŭ “universalaj sciencoj”.

La juna instruisto kaj la estro de la familio, kiu en aprilo 1862 pligrandiĝis (naskiĝis la filino Fejgla), zorge klopodis vivteni la lernejon, kiam konkurenco iĝis tre forta. Krome multobliĝis kontraŭleĝaj lernejetoj, ekzemple, tiu de Bernard Wildenbaum (haskalano veninta el Varsovio). En somero 1862 la ŝtataj aŭtoritatoj suspektis, ke la aŭtoro de anonima letero pri tio estis Marko Zamenhof, kaj la kialo estis la luktado kontraŭ konkurencaj entreprenoj. Ĉeokaze oni rimarkis, ke tio ne estis la unua fojo, kiam Marko Zamenhof informis la aŭtoritatojn pri kontraŭleĝaĵoj. La lernejo travivis tiam malfavoran periodon. Oni menciis ĝin ankoraŭ en 1864, kiam lernis tie 63 lernantinoj.

La familio Zamenhof ĉiun duan jaron — kaj pli ofte — pligrandiĝadis. Krom Lazaro kaj Fejgla naskiĝis ankaŭ: Gitla en 1864, Sora Dvora en 1866 (mortis infanaĝe), Fabian en 1868, Herŝ en 1870 (mortis post ok semajnoj), Grigorij en 1871, kaj la lasta naskita en Bjalistoko, Minna en 1872 (mortis komence de 1873). En Bjalistoko naskiĝis do ok gefiloj de Marko kaj Liba Roĥla Zamenhof, el kiuj tri estis entombigitaj ĉe loka tombejo.

Post la ŝanĝo de nomoj en 1871: Mordĥe iĝis Marko, Liba Roĥla iĝis Rozalio. Same pri kelkaj infanoj: Gitla iĝis Aŭgusta. Grigorij-Grzegorz (ankaŭ konata kiel Henryk) jam havis kristanan nomon, same kiel la naskiĝintaj jam en Varsovio Leon (1875) kaj Aleksander (1877). Al la plej juna filino oni donis originalan romian nomon Ida (1879).

Eble pro realigo de instrureformo kaj ŝanĝo de la Bjalistoka gimnazio al reala lernejo (1872) kaj lanĉo de novaj

fakultatoj: komercista, ĥemia-teĥnika kaj meĥanika-teĥnika, aperis neceso dungi novajn instruistojn. Verŝajne tiam oni dungis Zamenhofon, kiu unu jaron pli frue ŝanĝis la nomon el Mordĥe al Marko. La nomŝanĝo okazis eble pro planata dungigo en laika lernejo, ĉar oni pli volonte akceptis nomojn, kiuj sonis kristane.

Tiutempe li estis jam konata instruisto de la germana lingvo kaj de geografio. Al lia populariĝo kontribuis libroj, fakte kelkdekpaĝaj konsultlibretoj, eldonitaj en Varsovio. Dum la restado en Bjalistoko aperis du: *Prepara kurso de ĝenerala geografio por elementaj lernejoj* (1869–1870) kaj *Lernolibro de la germana lingvo por rusa junularo. Laŭ la plej sukcesa metodo* (ekde 1871 aperis naŭ eldonoj).

En 1868 la Ruslandaj aŭtoritatoj nuligis la regulon, laŭ kiu la judoj devis ricevi permeson por restadi kaj ekloĝi en la tiel nomata Pola Reĝlando. Sendube tio helpis al Marko Zamenhof decidi pri transloĝiĝo al Varsovio — la urbo, kie la kariero estis multe pli ebla ol en Bjalistoko. En Varsovio loĝis ankaŭ la parenca familio de lia bofrato Szwarcenberg.

Verŝajne, la kialo de la elmigro estis simpla. Malboniĝantaj vivkondiĉoj devigis Markon Zamenhof serĉi novajn eblecojn mongajni. Kaj lia ambicio estis klerigi siajn gefilojn, kaj tio postulis pli grandajn enspezojn. La famiilestro iris sola al la ĉefurbo de la tiama Pola Reĝlando kaj, luinte loĝejon ĉe la strato Nowolipie 28, li venigis tien la familion el Bjalistoko. La transloĝiĝo okazis en decembro 1873.

En Bjalistoko daŭre restadis familio de la frato kaj la fratino de Marko, de Josel Volf Zamenhof kaj Rivka Fridman. Iuj el ili loĝis tie ankoraŭ fine de la 19a kaj komence de la 20a jarcentoj. Ĉu Ludoviko havis kontakton al ili? Ĉu eble li vizitadis Bjalistokon pro gravaj, familiaj okazaĵoj? Eble li estis tie, kiam mortis lia onklino, Sora Zamenhof? Ĝis nun tiuj ĉi demandoj restas neresponditaj.

Tradukis el la pola  
**Przemysław Wierzbowski**

Ĉi tiu teksto estas resumo de la 45-paĝa pollingva studo *Zamenhofowie w drodze do i w Białymstoku*, kiun Zbigniew Romaniuk ĵus eldonis en Brańsk. La originala teksto enhavas tre detalajn priskribojn de la arkivaj dokumentoj kaj multajn referencojn.

Bjalistoko: la domo ĉe la angulo de la stratoj Verda kaj Blanka





# Serpentoj en la puto

*fragmento el la dua parto  
de la plej nova romano  
de István Nemere*

## EN LA URBO

**La 24-a de septembro, 14.16**

Tarik atenteme aŭskultis Abu Mussa.

Ili sidis en parko, proksime al la vendoplaco. Inter la arboj ili vidis nefore la fruktovendejojn, la floristojn, vendistojn de infanludiloj.

— La tasko ne estas malfacila, — diris la viro. — Jen ĉi tie, rande de la parko vi transprenos dorsosakon. Ĝi ne estos peza. Vi devos ĝin porti tra la placo. Al la kontraŭa bushaltejo. Ĉiamaniere vi devos iri tra la vendoplaco, ne ĉirkaŭiru la placon. En la homamaso neniu rimarkos vin. Ĉu vi scias, kio estas en la sako?

— Eksplodaĵo, — respondis Tarik. Ĝis nun li nur aŭdis pri tiaj aferoj. Nun kaptis lin iu granda sento. Antaŭ ol ili venis el la kaŝejo, oni regalas lin per teo, kiu havis iom strangan guston, sed lia humoro pli-boniĝis. Nenio gravis nun krom la tasko, kiun Alaho donas al li pere de Abu Mussa.

— Kiam vi venos al la haltejo, atendu la alvenon de aŭtobuso. Tutegale, kiu venas la unua, kun kiu numero kaj direkto. Gravus, ke multaj pasaĝeroj sidu ene. Eniru kaj konduku tiel, ke neniu atentu vin. La sakon metu al viaj piedoj, poste puŝu sub la sidlokon. Ĉe la sekva haltejo elaŭtiĝu kaj revenu perpiede ĉi tien. Mi atendos vin ĉi tie, sur la benko.

Tarik iom miris, sed komprenis: Abu Mussa certe bone scias, kion diras, ja estas li sendito de Alaho.

— Kiam mi ekiru? — li demandis, kaj la voĉo iom ŝtopiĝis. Abu vidis lian ekscitecon kaj volis lin trankviligi:

— Ĉio en ordo, trankvile, frato! Tio estos nur via unua tasko, kaj poste multfoje vin vokos Alaho. Estu kuraĝa kaj lerta!

Tarik stariĝis. Ili venis al aŭto, atendanta rande de la parko. Abu prenis el ĝi la sakon kaj helpis al Tarik meti ĝin dorsen. Ĝi vere ne estis peza. Tarik vidis dek sep printempojn, do li sentis sin forta. Abu postrigardis lin kaj kondukis la aŭton neforen, denove haltis. Bone li vidis Tarik-on, kiam tiu iris tra la vendoplaco. Abu prenis en la manon etan aparaton. Tarik malaperis en la densejo de la homoj. Abu Mussa movigis la aŭton, silente kalkulis ĝis dek, kaj premis la butoneton de la aparato...

La aerpremo atingis eĉ lian veturilon. La nevidebla puŝondo trankuregis la stratojn. En la vendoplaco fajro batis al la ĉielo kaj faris krateron en la asfalto. Abu Mussa tion vidis nur en la retrospegulo, poste li jam veturis plu. Li ne atendis ĝis venos policaj aŭtoj kaj fermos la tutan ĉirkaŭon.

## SUR LA VENDOPLACO

**La 24-a de septembro, 14.31**

Kiam la veturilo de sinjorino Wahlberg venis surloken, jam egis la ĥaoso.

La virino diris al sia ŝoforo halti pli fore. Multege da ĵurnalistoj kaj televidkameraoj estis ĉiufanke, kaj kelkaj konas ŝin. Ne estus taŭge, se ili vidus ŝin, tuj ili anoncegis al la Urbo, ke surloke estas jam la kontraŭteroristoj. Kaj ĝis kiam ne certas, ke okazis terorista ago, ŝi kaj ŝiaj homoj ne havas ĉi tie laboron. Eble nur gasmotora aŭto eksplodis? Do Wahlberg ankoraŭ atendis, kaj aŭskultis la stacion *Radio-Unu*, kiun oni ĝenerale traktis kiel kompetentan.

“Terura estas la vidaĵo! Ĉie kuŝas

partoj de homaj korpoj, koŝmaro... Oni eĉ ne volas kredi en la unua momento, ke tiuj estas realaj, ke antaŭ dudek minutoj tiuj pecoj sangaj estis vivantaj, irantaj, parolantaj homoj... Mi vidas ŝuon. Similajn portas maljunaj pensiulinoj nun, komence de aŭtuno. Mi vidas nun unu pecon, kaj el la ŝuo eliĝas sang-oza osto, piedosto... Aliloke kuŝas brako kaj kelkaj pecoj de vestaĵo. Ĉio sanga. La proksimaj budoj de vendistoj disfalis, lignotabuloj kaj torditaj ladaj platoj, brulintaj iom... La eksplodo plej verŝajne okazis inter vendejoj de vestoj kaj de fruktoj. Tie la aĉetantoj densiĝis. Iu diris antaŭ momento, ke almenaŭ dudek homoj mortis ĉi tie dum sekundo...”

Poste komencis brueti la telefonoj. En la aŭto kun malhelaj fenestroj estis almenaŭ ses, plus la poŝtelefonoj. Wahlberg laŭvice prenis ilin.

— Sinjorino, la lokon de krimo ni fermis, — raportis leŭtenanto Kaiser. Li apenaŭ finis la frazon, jam raportis Frey:

— Mi komencis la kontrolon de la vunditoj. Ni povas kalkuli je kelkdek personoj. Mi notas, en kiujn hospitalojn portos ilin la ambulancoj.

Ankaŭ Laura Torn estis jam tie:

— Mi venis kune kun la policaj teknikistoj. Surloke de la eksplodo aperis negranda kratero, fakulo jam esploras ĝin. Ni komencis kolekti la pecojn de la eksplodigilo.

Majoro Rivera ĉeestis la priaŭskultadojn de la atestantoj. La amaso netuŝita de la eksplodo unue diskuris, poste la polico tenis ilin kune. En iu malplena budo oni komencis ilin priaŭskulti, po unu.

La ĉarma raportistino de TV *Nova* ekvidis la atendantan nigran aŭton kun netravedeblaj fenestroj. Ŝi



vidis, ke la policistoj ne proksimiĝas al ĝi, kvankam ili kontrolas ĉiun alian aŭton tie atendantan, notas la numerojn kaj aliras la ŝoforojn revenantajn ĝuste al siaj veturiloj. Do ŝi vokis sian kameraiston kaj impete ekiris al la nigra aŭto. Sed ĝia ŝoforo spegule rimarkis ilin kaj atentigis Wahlberg, kiu ordonis tuj forveturi. Sinjorino Wahlberg survizaĝe havis nenian esprimon — jam ekde *tiam*. Ne ridetis, ne ridis, ne ploris kaj ne montris malĝojon. Ŝia vizaĝo estis kvazaŭ skulptaĵo, eĉ eble tiujn kelkajn sulkojn skulptisto enigis en la haŭton. Sinjorino Wahlberg ne ŝatis la amaskomunikilojn, precipe televidon, ĉar ili famigas la teroristojn jam per tio, ke simple okupiĝas pri ili.

Dum vojaĝo la virino pertelefone sendadis siajn ordonojn:

— Kaiser, diru al la policaj fotistoj kaj filmantoj, ke ili miksiĝu en la homamason sur la placo, ĉirkaŭ la kratero, kaj nerimarkate filmu ĉiujn gapantojn. Inter ili povas esti ankaŭ la eksplodigantoj. Mi volas vizaĝojn, ĉu vi komprenas? Vizaĝojn! Frey, ne forgesu, ke povas esti apenaŭvunditoj, kiuj eble ion vidis, sed ne troviĝas sur la listo de vunditoj. Serĉu ilin, demandu la gapantojn, ĉu ili vidis iujn, kiuj nur iomete vundiĝis? Rivera, demandu la atestantojn ankaŭ pri tio, kiujn ili vidis ĉirkaŭ si en la lasta minuto.

Laura anoncis sin:

— Sinjorino, la nombro de la mortintoj estas pli ol dudek, laŭ la fakuloj la eksplodmaterialo enhavis ankaŭ semtekson.

— Prenu el ĉiu korpoparto DNA-provetojn, — la virino finis la parolon kaj kolere pensis: semtekso! Terura materialo! Sed ŝi nenion diris.

La raportistino de la TV *Nova* finis sian raporton. Nur du minutojn ili elsendis el la vendoplaco, sed promesis baldaŭ denove anonci sin de la terura loko. La kameraisto nun havis tempon por demandi ŝin:

— Kial ni kuregis post tiu nigra aŭto?

— En ĝi sidis la Nigra Vidvino. Sinjorino Wahlberg, la ĉefino de la Kontraŭterorisma Grupo de la Urbo.

— Virino estas ilia ĉefo?..

— Kial vi miras, virŝovinisto? Similas vi al la aliaj viroj. Kial ne povus esti virino la ĉefo? Krome, ŝi meritis tiun postenon.

— Per mitraletoj ŝi pafadis al la araboj, ĉu? Kaj ŝi trafis ĉiun turbanon?

— Estas vi eksterordinare stulta, — la virino ĵetis rigardon al la ĉielo.

— Teroristoj povas esti ne nur araboj, eĉ la islamanoj ne ĉiuj estas araboj, sciu. Jes, sinjorino Wahlberg vere batalis kun armilo enmane, antaŭ dudek jaroj ŝi estis la unua virina ano de la kontraŭterorisma grupo. Iutage teroristoj pro venĝo mortpafis ŝian edzon kaj sesjaran filon. Nun vi paliĝis, mi vidas, jes?

Wahlberg senmova sidis en la aŭto. Ne devis ŝi persone traserĉi la lokon de krimo, por ekscii la detalojn. Faros tion la kunlaborantoj, kiuj pli bone kaj fake konas tiun laboron. Ŝi denove parolis al unu el siaj telefonoj:

— Kaiser? Nova tasko por vi. Lasu jam tiun lokon kaj ĉirkaŭiru la placon, kolektu la filmojn el la sekurec-kameroj de la vendejoj, kiuj havas ilin. Ni bezonas ĉiun filmon, kiu pretiĝis inter la dek-tria tridek kaj dek minutoj post la eksplodo. Kiu ajn estis tiu kamerao, en kiu ajn direkto ĝi “rigardis”, ni bezonas ĉiujn! Mi alarmos la analizistojn, post unu horo ili jam komencos trarigardi la filmojn.

La virino atendis, ke ankoraŭ foje eksonoros iu telefono. Estis ŝi certa, ke sonoros. Kaj jen, ĝuste ĝi sonoris diskrete. Wahlberg prenis la malvarmetan aŭdilon:

— Jes, sinjoro urbestro, mi kaj miaj homoj estas jam surloke. Ni venis kelkajn minutojn post la

evento. Mi diris “evento”, ĉar ni ankoraŭ ne povas esti certaj, ke okazis atenco... Sed post kelkaj minutoj ni havos la certecon. Ni jam trovis la spurojn de eksplodiga materialo, tamen mi parolas ankoraŭ singarde. Ni kompreneble faros ĉion... En tiu stato de la aferoj, kiam apenaŭ dudek kvin minutoj pasis post la faro. Ni laboras, sinjoro. Se ni ion gravan ekscios, post la ĉefo de polico vi estos la dua, kiun mi sciigos. Mi garantias tion, sinjoro.

## TV NOVA

La 24-a de septembro, 14.44

En la redakcion de novaĵoj oni alportis la aparaton, sur la tablon de la ĉefo. Alvenis ankaŭ kolegoj, unu el ili anhelante rakontis:

— Ĉefo, tio alvenis antaŭ minutoj. Certe el magnetofono venis la voĉo, ĉar la parolanto trifoje ripetis. Sen akcento li parolas, samkiel ni, — li puŝis la butonon kaj tuj venis el la aparato la trankvila vira voĉo:

— Hodiaŭ posttagmeze Ahalo montris sian forton. Multaj nekredantoj perdis la vivon en la malobeema Urbo. Sed tio estis nur atentigo. La kulpintoj estos punitaj, kaj tion oni jam ne longe devos atendi.

— Kion fari kun tio? — demandis iu. La ĉefo ankoraŭ ne respondis. Malbone li fartis, kiel ĉiuj ĉi tie. Alia redaktoro rimarkis:

— Se ni tion disaŭdigos, la Urbo falos en panikon.

— Se ni ne disaŭdigos, ni respondecos, ke oni ne povis prepari sin por la sekvonta atako, — jen la opinio de alia. Ili jam kutimiĝis: en ĉiu afero devis koni kaj diskonigi almenaŭ du opiniojn kontraŭajn unu al la alia, ja estis ili liberaluloj. La ĉefo ankoraŭ ne decidis, videble tre streĉe pensegis. Kaj kiel ofte, ankaŭ nun li elektis la kompromison:

— Ni disaŭdigos ĝin... vespere. Sed pli frue mi sciigos pri ĝi la policon, kaj mian ĉefon.

*Serpentoj en la puto* estas mendebla ĉe la libroservo de UEA kaj ĉe aliaj libroservoj kontraŭ 18 eŭroj. En Litovio, Pollando kaj Ruslando oni povas aĉeti la romanon rabatite (petu informojn ĉe la redakcio).



## Heroldo de Esperanto

La germana junulo Teo Jung ankoraŭ en 1910 “ekpensis pri ofte aperonta periodaĵo en taggazeta formato”, por kiu li eĉ desegnis la grandliteran titolon *La Tago*. Akirinte sufiĉan vivo- kaj movado-sperton, kaj iĝinte kunposedanto de la patra (kune kun la pli juna frato) presejo, Jung decidigis al eldono en 1920. Li pretigis la 1an de marto reklaman prospekton, en kiu li i.a. skribis:

“Ĉiu popolo posedas sian gazetaron, kiu pledas por ĝiaj specifaj interesoj; en ĉiu civilizita lando ekzistas en ĉiu grandeta urbo ĉiutaga ĵurnalo, en ĉiu iom respektinda loko semajna gazeto; eĉ la plej malgranda popolo havas almenaŭ unu grandan ĵurnalon. Sole la popolo esperantista tian ne havas”.

La 14an de aprilo (je la mortodato de Zamenhof) aperis la unua provnumero de *Esperanto Triumfonta*, okpaĝa ĵurnalo grandformata (29×45 cm). Ekde novembro ĝi ĉiusemajniĝis. Dum la jaro 1925 ĝi eliris eĉ duonsemajne. Okaze de la du UKoj en Germanio (1923 kaj 1933) ĝi efektive estis ĉiutaga. En januaro 1925 la gazeto ricevis la novan nomon *Heroldo de Esperanto*, kaj iom poste akiris la rekoneblan masivliteran titolsildon, kiu konserviĝis ĝis nun.

La subtitolo iom variis intertempe:

1921: Ĵurnalo internacia, universala, sendependa;

1925: Neŭtrala organo de la Esperanto-movado;

1932: Sendependa organo de la Esperanto-movado.

Ĝis aŭtuno 1928 *Heroldo* aperis en Horrem apud Kolonjo, ekde tiam en Kolonjo mem, kie Jung fondis Esperantan entreprenon, kiu bone evoluis el la financa vidpunkto. Ĉiusemajna aperritmo postulis laboron de tuta stabo (ĝis 12 personoj), krome en 1925 estis fondita Librofako. Teo Jung, la fondinto kaj posedanto, plenumis ankaŭ redaktan laboron. Krome, J. F. Berger funkciis kiel respondeca redaktoro, kaj M. Witland kiel anonca redaktoro. La amplekso variis: 4-6-8-10 paĝoj grandformataj.

La intenco de Jung estis, ke la enhavo estu duone pri- kaj duone per-Esperanta, kun multaj ilustraĵoj, precipe pri tutmondaj aktualaĵoj. Oni trovas bonkvalitajn portretojn de ŝtatestroj kaj politikistoj, sciencistoj kaj verkistoj. Aperis diversaj aldonoj, ekzemple, *Lingva Kritiko*, ankaŭ apartaj eldonaĵoj kiel *Verda Stelo*. Inter la regulaj temaj paĝoj estis: *La Bela Mondo* (turismo k.s.), *Nia*

*Revueto* (por junuloj), *La Strigo* (literaturo kaj artoj), *Humuro*, *Distro*, *Ludo*, radiopaĝo *La Anteno*, muzika paĝo *Sur la kvin linioj*, ankaŭ *La Regno Virina*.

Regule aperis la rubrikoj *Niaj leteroj el Tutmondoj*, *La Libera Tribuno de l' Esperantistaro* kaj *La politiko en la opinio de l'esperantistaro*. Kelkaj kontribuoj en tiuj rubrikoj elvokis inter esperantistoj tiel akrajn vortbatalojn, ke fine Jung rezignis pri politiko.

Ne malofte aperis tutpaĝaj artikoloj. El numero al numero publikiĝis *Mondvojaĝo por Esperanto* de Joseph R. Scherer, organizita de la Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado. Escepte de kongresaj raportoj, precipe el UKoj, aliaj materialoj priesperantaj estis telegrafstilaj informoj. La bibliografia rubriko enhavis recenzojn kaj mallongajn libroprezentojn.

Post sia unua jaro la ĵurnalo kalkulis ĉ. 850 individuajn abonantojn, opaj aĉetantoj estis 350, do, sume, la abonantaro estis 1200. En 1936 la abonantaro de *Heroldo* kreskis ĝis ĉ. 2600.

Favora evoluo de la entrepreno estis unue bremsita pro la monda krizo, kelkajn jarojn poste pro la establiĝo de la nazia reĝimo en Germanio. La numero 888 eliris en julio 1936, poste la familio Jung transloĝiĝis al Nederlando, kaj la 11an de oktobro en Scheveningen li rekomencis la eldonadon de *Heroldo*, kun la subtitolo: “Oficiala semajna organo de Internacia Esperanto-Ligo”. Tia ĝi estis ĝis la invado de nazioj en Nederlando abrupte rompis la eldonadon per la numero de la 1a de majo 1940. Aperis du t.n. “militeldonoj” (decembro 1940 kaj marto 1941) por la legantoj en Nederlando kaj Germanio, ĉar kontakto kun la aliaj landoj ne plu eblis.

La restarto iĝis ebla post la fino de la milito. La reaperon antaŭanoncis prospekto, kaj la 14an de aprilo 1946 enmondiĝis “Sendependa internacia organo de la Esperanto-movado”.



Jung esperis unue atingi duonmonatecon, kaj post pliboniĝo de la cirkonstancoj denove havi ĉiusemajnan periodecon. Tamen tio neniam efektiviĝis. La unuaj postmilitaj jarkolektoj havis malmultajn fotojn. Iom post iom fotoj plimultiĝis kaj en 1954 reaparis la rubriko *Fotofilmo*, kun malgrandformataj fotoj. La enhavo iĝis preskaŭ tute priesperanta.

En 1962 Theodor Karl August Heinrich Jung (jen la plena nomo) transdonis la redaktadon al “pli junaj manoj”. Lia posteulino iĝis pola esperantistino Ada Fighiera-Sikorska, antaŭe redaktorino de la Esperanto-fako de Pola Radio. Por administri la ĵurnalon estis fondita societo sen profita celo laŭ la belga leĝo. Fighiera-Sikorska daŭrigis la linion de sendependa ĵurnalismo. Jung kaj Fighiera-Sikorska ne hezitis diri sian opinion pri la konfliktoj en Esperantujo kaj plurfoje mem deklaris malkonsenton, ekzemple, kun *Germana Esperantisto* kaj Ellersiek en la jaroj 1920aj, kun UEA en 1930aj, kun Lapenna en 1970aj...

La gazetaj tekstoj daŭre estis aranĝataj en kvar kolumnoj facile legeblaj.

En 1980 la subtitolo iĝis “La plej ofta gazeto de la Esperanto-movado”, post du jaroj “La internacia sendependa gazeto de la Esperanto-movado”.

La 17an de julio 1996 Ada Fighiera-Sikorska, jam grave malsana, subskribis la protokolon, laŭ kiu ekde 1997 *Heroldo* transprenis la Kooperativo de Literatura Foiro. Post pli ol 70 jaroj kun nur du redaktoroj komenciĝis vigla rotacivado de personaro:

1997–2000: Perla Martinelli;

2000–2001: Stano Marček;

2002: Redakta komitato 1: Marco Picasso, Giorgio Silfer, Walter Ŝelazny; Redakta komitato 2: Marie-France Conde Rey, Perla Martinelli, Walter Ŝelazny;

2003–2004: Marie-France Conde Rey, Perla Martinelli;

2005–2007: Dieter Rooke, Giorgio Silfer;

2008–2009: Aneto Muhlemann, Dieter Rooke.

Ankaŭ la subtitolo ŝanĝiĝis en 1998 al “Internacia sendependa gazeto de la esperanto-mondo” kaj en 2002 al “Informa gazeto pri la esperanto-mondo”.

Kun 17 numeroj jare *Heroldo de Esperanto* restas la plej ofta gazeto en Esperantujo. Ĝi ne plu estas senpartia kaj supertendeca, sed klare profilita por la Esperanta Civito, kaj kontraŭ la tradicia movado, kape kun UEA.

**Halina Gorecka**



## Laŭ Marvirinstrato al nekonataj landoj...

Westover, Tim. *Marvirinstrato: Originalaj noveloj en Esperanto*. — Lawrenceville: Eldonejo Literatura.net, 2009. — 211 p.

La novelaro *Marvirinstrato* de Tim Westover estas libro novtipa kaj forme (oni povas ne nur mendi-aĉeti ĝin kiel kutime, sed ankaŭ diversmaniere ekhavi elektronike el la retejo [www.marvirinstrato.com](http://www.marvirinstrato.com) — tie troveblas ĉio necesa) kaj enhave — ĝi tute ne similas aliajn librojn.

La libro enhavas dek ok novelojn, plejparton el ili oni nomu fabeloj. Ili ne similas kutimajn fabelojn, estas misteraj, eble mistikaj, strangaj... kiaj ankorau?

Ĉio okazas en iu fabela mondo ekster nia tempo kaj spaco. Personaj kaj lokaj nomoj koncernas neniun nacion/landon; el realaj nomoj estas menciataj nur monde konataj de jarcentoj.

Eble tiaj noveloj povis aperi nur en Esperanto — sed pri tio iom pli sube.

Ĉiu fabelo ja ion instruas. Certe — la vivon. Ke amo instigas homon al malraciaj agoj, kiuj povas eĉ pereigi lin. Ke oni povu vidi admirindajn miraklojn eĉ en kutimaj aferoj. Se iom konkrete, do:

*Marvirinstrato* — ĉio ŝajnas plimalpli klara kaj natura (almenaŭ, ene de fabela naturo), sed unu lasta frazo ŝanĝas ĉion, revenigante enigmon.

*Ruĝvela Ŝipo* — oni memoru, ke en realo ĉio perdita aŭ detruita pro senpenso hasta ago neniam reaperos.


*Spektaklo* — estas observo de homkonduto en specifaj situacioj. Nu jes, bele karikaturlita kaj abstraktigita por ofendi neniun konkretan.

*Parodibirdo* mokas “profesorojn, mediprotektantojn kaj kristanojn” kaj krome — naivecon de ordinaraj homoj.

*Labirintoj* — ke ne eblas plenumi samtempe ĉiujn rekomendojn (tiuteme ekzistas bona ruslingva fabelo *Elefantopentristo*), sed ankaŭ ĉi tie la fino alportas tute alian moralon.

*Fiŝhepatoleo* memorigas plurajn konatajn fabelojn, sed denove: la fino estas ne simila al tiu de tradiciaj fabeloj. Oni povas eĉ dubi, ĉu la bono venkis aŭ ne.

*Akvoturo, Akvokruĉo* — ke “pura” arto sen praktika uzo ne havas sencon, ke vivo povas plene ŝanĝiĝi pro iu komence bagatela kaŭzo.



*Pigopago; Enanimigo; Meduzet'* — oni mem pripensu, kion celas esprimi tiuj fabeloj. Nu certe, birdoj, kuiriloj kaj meduzeto alegorias homojn, sed ne ĉio tiom simplas...

*La Kuko de la Sabla Maro...* — ŝajnas komplete absurda, sed eble iu trovos la maskitan filozofion ankaŭ ĉi tie. Kaj sendube, ankaŭ en la supremenciitaj fabeloj vi probable trovos ion tute alian, ne tion kion trovis mi...

Krom la fabeloj enestas noveloj de alia ĝenro. Jen akre satira parodio pri reklamo (*Kelkaj Vortoj de Nia Subtenanto*). Cetere, la reklamata en ĝi “Farao-na faruno” figuras ankaŭ en kelkaj aliaj noveloj de la libro.

Mi jam menciis, ke tiu libro povus aperi nur en Esperanto — do jen ricevu:

*Estimata Vi!* — dekomence estas groteska satiro pri Esperanto-movado, pri ties ŝablonoj, mitoj kaj blufoj, sed ankaŭ ĉi tie, samkiel en aliaj noveloj, la lasta alineo plene ŝanĝas la tuton. Mi ne senigos vin je la surpriza plezuro...

Kaj la plej akra satiraĵo pri Esperanto-mondo estas la lasta ero — *Antaŭparolo al la Plena Verkaro de Yvette Swithmoor*. Per kelkaj trafaj frazoj la aŭtoro senkompate montras “preskaŭ panoramon de la nuna

Esperanto-literaturo”. La verko estas samtempe parodio pri recenzoj kaj antaŭparoloj, abundaj en la Esperanto-literaturo, kun troaj laŭdoj kaj fantaziado de literaturologoj, kiuj en verkoj nepre trovas ion, pri kio la aŭtoro mem eĉ ne suspektis. Eĉ kelkaj konkretaj aŭtoroj estas aluditaj per mencio de iliaj ŝatataj temoj kaj ĝenroj (aŭ eble mi mem jam fantazias kiel la literaturologoj?).

La plej longa novelo-fabelo, *Tri Ruĝaj Knabinoj*, teme neniel koncernas Esperanton, tamen havas epigrafon el *Zamenhof, Aŭtoro de Esperanto* de Marjorie Boulton, kaj en la teksto mem estas disŝutitaj jenaj frazoj: “Forton pli freŝan mi akiris”, “Mi paŝon post paŝo atingis (la kuirejon)”, “... belegaj floroj, kiujn vi akiris rekte kaj kuraĝe, ne timigite [...] kaj konservis dum la densa malvarmo [...] kie vi pacience kaj obstine eltenis” (p. 42), “Jam temp’ está” (p. 47), “Pluvas kaj pluvas!” (p. 48), “la decida hor’” (tiel, kun apostrofo, p. 52). Aliloke: “Eĉ post longa laborado venis nenia venko” (p. 108). Ial rememorigas la “falsloraj rakontoj” de David Jordan...

Eraroj preskaŭ ne estas, mi rimarkis nur “betona kvadrato kiun oni nomis ĝardenon” (p. 21) kaj “Frederiko [...] kaptis insektoj por uzi en eksperimentoj” (p. 90); ankorau en kelkaj lokoj frazo sonas iom strange, sed mi ne insistus, ke temas pri eraro — eble nur nekutima stilo. Tre plaĉis al mi sukplena freŝaj esprimoj kiel “Jen mi trafas en saŭcon” (p. 38), “mi sentis dekojn da etaj nigraj okuloj bekpiki min” (p. 121). “Sorĉistoj delonge forestis en la tuta lando, depost kiam la kristana registaro enkondukis severan imposton pri la necesaj ingrediencoj por sorĉrinkaĵoj.” (p. 154)

Certe, la libro instruas bonkorecon kaj aliajn pozitivajn trajtojn, sed iom alimaniere, ol tradiciaj popol-fabeloj. Ĝi nepre estas leginda. Dum legado vi ĝuos la intrigojn, subitajn ŝanĝojn kaj bonegan lingvaĵon, poste vi eble longe pensados pri diversaj aspektoj de nia vivo...

**Valentin Melnikov**

Pro diversaj ĝenaj cirkonstancoj lastatempe ni neglektis kelkajn el niaj projektoj. Ekde januaro ne aperas novaj programoj de *Radio Esperanto*; nia retejo ne estas aktualigata; kelkaj petoj kaj korespondaĵoj ne estis traktitaj ktp. Ni sukcesis plueldoni la *Ondon*, kvankam la antaŭa kajero devis esti duobla. Tamen en julio la situacio pliboniĝos, kaj ni aktualigos kaj akuratis niajn ĉefajn aktivadojn. Dankon pro viaj pardonemo kaj komprenemo!

**HaGo**

**AlKo**

## La somera Spegulo

La kajeron malfermas redakcia artikolo *Ĉu nova Esperanto-movado? Kial, kiam?* Okpaĝa densa teksto, ne facile legebla, ĉar ne dividita je ĉapitroj. La redakcio direktas kritikon al UEA, UKoj, la revuo *Esperanto* kaj konkludas:

«Ni apartenas al tiu generacio de esperantistoj, kies pacienco elĉerpiĝis: rilate la “libertempo-konceptan” Esperanto-movadon, rilate la diletantecon kaj naivan sindefendadon en vastaj Esperanto-medioj, rilate la pseŭdoutilecon, indiferecon kaj fuŝagadon de Esperanto-aktivuloj, rilate la banalecon de multaj Esperanto-produktoj kaj -servoj, rilate la stagnadon kaj vanecon de la diskutoj pri Esperanto, rilate la kondamnon al sensignifeco de Esperanto en la mondo, rilate la senperspektivecon de la afero».

Andreas Künzli intervjuas la polan sociologon Walter Ŝelazny pri pluraj temoj: pola sociologio kaj la eventoj de 1968 en Varsovio, problemoj de la E-movado en ekssocialismaj landoj, PSEK kaj PEA, ideologio de Zamenhof, raŭmismo kaj civitismo, UEA kaj la Manifesto de Prago k.a.

La repesita rakonto *La infano revadas* de Ferenc Szilágyi omaĝas la Zamenhofan jaron.

Tomasz Chmielik esperantigis fragmente la tekston *La jarcento de optimistoj-krimuloj* de la madrida profesoro de politikaj sciencoj Rafael del Aguilla, kiu analizas la 20an jarcenton, laŭdire “la plej malbonan en la historio”.

Andreas Künzli daŭrigas la rubrikon *Orienteŭropa enciklopedieto* per Bjali-stoko. Li donas superrigardon pri la urbo tra diversaj epokoj, kun aparta atento al la judoj (iufoje nomataj hebreoj). Krom prezenti faktojn, kiel konvenas en enciklopedio, Künzli donas takson de la eventoj laŭ tipe okcidenteŭropa vidpunkto.

Du poemoj de Czesław Miłosz en la traduko de Kris Long preludas eseon de Jan Błoński *Povraj kristanoj rigardas la geton* pri la morala respondecado de poloj dum Holokaŭsto.

*Spegulo* por la dua fojo aljuĝis siajn statuetojn, ĉi-foje al Julia Zsigmond (Rumanio), Lucija Borčić kaj Spomenka Štimec (Kroatio), Bardhyl Selimi (Albanio), Ilona Koutny kaj Halina Oleszek (Pollando).

Fine de la revuo aperas komento de Gian Carlo Fighiera pri *La Asocio* de Ziko van Dijk.

Legis por vi  
**Halina Gorecka**



Filip David

## Libro pri amo kaj morto

**David, Filip. *Sonĝo pri amo kaj morto* / Tradukis el la serba Agnesa Eremija. — Beogrado: Interpress, 2009. — 176 p., 300 ekz.**

La aŭtoro, Filip David, estas tre sukcesa verkisto kaj dramisto en la serba lingvo. Pri li ni en la cetera mondo malmulton scias. Interreto konigas, preskaŭ senescepte en la serba lingvo, nur negrandan nombron da retpaĝoj pri li kaj liaj verkoj. Kio tamen klaras, en la paĝoj kiujn oni povas legi (per aŭtomata Google-tradukaĉado), estas ke liajn verkojn karakterizas iom bizaraj stilo kaj temoj.

Efektive la libro enhavas du apartajn romanetojn: *Mallonga romano pri amo* kaj *Mallonga romano pri mortado*.

La unua, pri amo, havas tre bizaran enhavon. Temas pri la juda kabalo, esoteramistika kaj “sekreta” movado, kiu pretendas klarigi al siaj adeptoj la kaŝitan signifon de la juda biblio, kaj ebligi koni kaj renkonti la diversajn interplektitajn mondojn, kies ekzistonte ne konas la ordinara homo. Ĝenerale, la intrigo de la romano estas ke knabo serĉas perfektan plej taŭgan knabinon kiel edzinon. Kabalanaj sciuloj direktas lin, helpas lin, li spertas multajn apenaŭ kompreneblajn eventojn, kaj fine trovas sian celatan amulinon. Sed kiam komenciĝas geedziga ceremonio, lin atakas demonoj, kaj dum provo liberigi lin de la demonoj, li ekmortas. Poste, sekreta kaj danĝera rito, per kiu la spiritoj de mortintoj povas en-nian-mondoniĝi, ebligas la gejunulojn efemere aperi kaj sciigi, ke en la spirita ekzisto ili povis plenumi la geedziĝon.

La dua romano, pri mortado, havas tute alian karakteron: multe malpli bizaran, sed ankaŭ multe malpli koheran. Ĝi rakontas scenojn el la nazia periodo en

Germanio, kaj sekvas la vivon de knabeto, kiun oni prieksperimentas por ebligi studon de la manipulebleco de la interna animo/menso de la infano. Rezultas frenezo, kaj iom post iom ni mem eniras la frenezan menson de la knabo, tiel ke ĝi kvazaŭ estiĝas la nia.

Kelkaj necesaj komentoj pri la duparta verko:

En la libro svarmas komposteraroj, ĉiupaĝe, kelkfoje ĉiulinie.

La traduko estas farita de persono, kies rego de la Esperanta lingvo estis preskaŭ egale fuŝa kiel la kompostado. Dolorigas legi la unuajn dekojn da paĝoj, pro la misgramatikaĵoj kombinitaj kun la komposteraroj. Lante, dum oni legas la lastajn dekojn da paĝoj, la misgramatikemo iom post iom malaperas, kvankam preskaŭ neniam la akuzativo estas ĝuste uzata. Kaj ŝajne neniu kompetentulo traekzamenis kaj korektis la komposterarojn. Ke la libron kompostis persono(j) ne komprenantaj la kompostatan lingvon, estas domaĝe neniel neofta fenomeno en nia presita literaturo. Sed la plena manko de korekto de la kompostaĵo mirigas eĉ la plej spertan recenzanton.

Mi teoriumas, ke la tradukon komencis persono kies kono de la Esperanta gramatiko ankoraŭ estis tiu de vera komencanto, sed kiu dum la periodo de la tradukado pli kaj pli kleriĝis pri la lingvo, tiel ke en la lastaj paĝoj gramatikaj eraroj komencis manki, escepte de la akuzativmisado.

Flankenmetinte la traduko- kaj kompost-erarojn, mi devas konfesi ke la bizara karaktero de la *Mallonga romano pri amo* tiom perpleksis min, ke mi sentis nur konfuzon. Do mi ne ĝuis ĝin. La dua verko, *Mallonga romano pri mortado*, naŭzis min, ne pro sia enhavo, sed ĉar ĝi spegulas la naturon de eventoj realaj. Kaj estante psikiatria psikologo, mi multe tro facile retrovas similan karakteron en personoj de mi renkontitaj kaj renkontataj, tiom ke mi vere malesperas pri la sorto de la homaro.

Se via psikologia “stomako” estas sufiĉe fortika, mi kontraŭvole rekomendas legi la duan romaneton. Kaj se via tolero de misuzado de nia lingvo estas sufiĉe forta, nu eble vin interesos la unua romaneto.

La libro mem estas bonaspekta, la preso estas klara kaj bonaspekta. Eĉ la paĝoj ne emas elfali, kaj tio ja estas vera raraĵo en nia aktuale eldonata libraro Esperanta.

**Donald Broadribb**



## La kvina romano pri komisaro Maigret en Esperanto



Pli ol sepdek romanoj pri komisaro Maigret, verkitaj de Georges Simenon, estas ŝatata legaĵo en la tuta mondo, kun pli ol 500 milionoj da ekzempleroj eldonitaj en kvardeko da lingvoj.

En 1999 danke al Daniel Luez, al ĉi tiuj lingvoj aldoniĝis Esperanto — per la romano *Maigret hezitas* verkita en 1968. La sukceso de ĉi tiu romano (la tuta stoko jam plene elĉerpiĝis) instigis la tradukanton kaj la eldonejon *Sezonoj* aperigi pliajn librojn pri Maigret en la Internacia Lingvo.

En *Maigret kaj la maljuna damo* (1949), kies Esperanta traduko aperis en 2002, la komisaro forlasas Parizon kaj veturas al provinco por esplori komplikan kazon de servistino Roza (eĉ, la Roza), kiu supozeble mortis anstataŭ sia mastrino.

Dum tridek kvin jaroj komisaro Maigret renkontis neniun el siaj samklasanoj, kaj jen al lia oficejo venis lia kunlerninto Leono Florentin, kiun la komisaro traktas profesie en *Amiko el la junaĝo de Maigret* (france 1968, Esperante 2004).

*La flava hundo* estas unu el la plej fruaj romanoj el la serio. Ĝi estis eldonita en 1931. La evento disvolviĝas en Concarneau, kie ĝis nun funkcias la restoracio *Admiralo* (L'Amiral). La Esperanta traduko aperis en 2007.

La titolo de la romano, kiun ni nun proponas, *Maigret eraras*, diras, ke la komisaro havas komplikan problemon, kiu povas erarigi lin. Li serĉas la murdinton de Louise Filon, iama putino, kiu lastatempe loĝis en apartamento en prestiĝa kvartalo en Parizo, kiun ŝia amanto, saksofonisto Peĉjo, ne kapablus pagi. Kaj nur en la antaŭlasta paĝo Maigret kaj la legantoj ekscias, kiu murdis la junulinon.

Ankaŭ la kvina Esperanta romano de Simenon estas tradukita de Daniel Luez. La 128-paĝa libro *Maigret eraras* aperis kiel la 17a volumo en la populara libroserio *Mondliteraturo*. Mendebila ĉe la libroservo de UEA kaj ĉe aliaj grandaj libroservoj kontraŭ 12 eŭroj. Litovianoj aĉetu en la Esperanto-domo en Kaŭno, ruslandanoj kaj pollandanoj mendu rekte ĉe nia redakcia adreso.

Bonan legadon!

HaGo

## Ricevitaj libroj

David, Filip. *Sonĝo pri amo kaj morto* / Trad. el la serba Agnesa Eremija. — Beogrado: Interpress, 2009. — 176 p.; 300 ekz. — (Biblioteka Esperanto; №1). — [Recenzoekzemplero].

*Jarlibro 2009* / Red. Roy McCoy. — Rotterdam: UEA, 2009. — 286 p.; il. — [Donaco de Halina Gorecka].

Klar, Walter. *Peter Altenberg. Ĉarma strangulo*. — Vieno: Klag, 2009. — 32 p., il. — [Donaco de Walter Klag].

Orpik, Paweł. *Słowniczek Esperanto*. — Białystok: Gazeta Wyborcza, 2008. — 18 p., il. — [Donaco de BES].

Romaniuk, Zbigniew. *Zamenhofowie w drodze do i w Białymstoku = Zamenhofoj survoje al Bjalistoko kaj en la urbo*. — Brańsk: Zbigniew Romaniuk, 2009. — 45 p., il. — [Donaco de Zbigniew Romaniuk].

Westover, Tim. *Marvirinstrato*: Originalaj noveloj en Esperanto. — Lawrenceville: Eldonejo Literaturo.net, 2009. — 211 p. — [Recenzoekzemplero].

Корженков, Александр Викторович. *Историја есперанта* / Превод са есперанта Прибислав Маринковић и др. — Београд: Есперантско друштво Радомир Клајић, 2008. — 166 с.; 200 экз. — [Donaco de la aŭtoro].

## Ricevitaj gazetoj

Aŭstria Fervojisto. 2009/2; Bazaro. 2009/1; Esperanto en Danio. 2009/3; Esperanto. 2009/5,6; Frateco. 2009/84; Heroldo de Esperanto. 2009/6; Internaciisto. 2009/2; Kataluna Esperantisto. 2009/349; Kontakto. 2008/6; La KancerKliniko. 2009/130; La Movado. 2009/699; La Ondo de Esperanto. 2009/5-6; La Revuo Orienta. 2009/4; La SAGO. 2009/54,55; Litova Stelo. 2009/2; Monato. 2009/6; NGGE Sciigas. 2009/82; Pola Esperantisto. 2009/2; Scienco kaj Kulturo. 2009/3; Sennaciulo. 2009/5-6; Spegulo. 2009/2.

## Kultura renkontiĝo en Razgrado

La 19a Esperantista Krea Renkontiĝo "Abritus-2009", 12–14 jun 2009 en Razgrado (Bulgario), estis dediĉita al la 90-jariĝo de la revuo *Bulgara Esperantisto*. En la debato pri la stato kaj la perspektivoj de la presorgano de BEA partoprenis kvardeko da samlingvanoj el pli ol dek urboj de Bulgario.

Ekskurso al la etnografia muzeo en vilaĝo Topĉij, amuzvespero kaj muzika programo en la dimanĉa tago pliriĉigis la programon. Ĉiujare, fine de la printempo, la Esperantista Domo de Kulturo "D-ro Ivan Kirĉev" organizas tiun kulturan feston, kiu jam fariĝis tradicio kaj enskribiĝas en la kultura aŭto de la urbo.

Estis anoncigitaj la rezultoj de la internacia literatura konkurso EKRA kun partopreno de 11 aŭtoroj.

La rezulto de EKRA-2009

Poezio:

Unuaj premioj al: Jaroslav Krolupper (Ĉeĥio) kaj Marie-France Conde Rey (Francio).

Unuaj premioj *Juna talento* al: Petronela Hojbota (Rumanio) kaj Daniela Unugurean (Rumanio).

Duaj premioj al: Benoit Philippe (Germanio) kaj Elena Popova (Bulgario).

Triaj premioj al: Dimitrije Janičić (Serbio) kaj Penka Papazova (Bulgario).

Pri humuraĵoj:

Dua premio al: Milena Georgieva (Bulgario).

Tria premio: Radka Stojanova (Bulgario).

Ĵurio: Venelin Mitev (prezidanto), Ivaniĉka Maĝarova, Ljubomir Trifonĉovski.

Premiitaj verkoj aperos en la revuo *Literatura Foiro* kaj en la bulteno *Esperantista Tribuno*.

HeKo

# Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Sendependa internacia  
revuo en Esperanto kun  
legantoj en 65 landoj!

■ Politiko ■ Komputado ■ Scienco  
■ Moderna vivo ■ Hobio ■ Sporto

**www.monato.net**

**Flandra Esperanto-Ligo**  
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen  
monato@fel.esperanto.be

Por la aprila *Krucvortenigmo* venis 21 respondoj, el ili nur 7 tute ĝustaj. Oni stumblis ĉe du vortoj: irito (agito) kaj/aŭ gute (glue). La tute ĝustajn respondojn sendis Karine Arakeljan (Armenio), Jackie Huberdeau (Francio), Zbigniew Tylkowski (Pollando), Jurij Kivajev (Ruslando), Mihailo Nešić (Serbio), Roland Larsson (Svedio) kaj Kenĉjo Goldbergo (Usono). La loto donis la libropremion al **Karine Arakeljan**. Ni gratulas!

**La ĝustaj respondoj.** *Horizontale:* 7. Ermito; 8. Oceano; 14. Tango; 16. Obolo; 18. Skeĉo; 20. Festivalo; 25. Otido; 28. Kaoso; 30. Motiv'; 31. Bicikl'; 33. Banano. *Vertikale:* 2. Irito; 3. Stelo; 5. Araneo; 6. Angoro; 11. Aperitivo; 18. Sesio; 19. Omano; 21. Ero-zio; 24. Latino; 29. Olimp'; 30. Monat'. *Laŭ arkoj:* 1. K(C)ipro; 4. Ostro; 9. Atolo; 10. Truk'; 12. Lunĉ'; 13. Fonto; 15. Gute; 17. Brom'; 21. Etiko; 22. Ibis'; 23. Nomo; 24. Latvo; 26. Tiel; 27. Duno; 32. Lampo; 33. Bunta.

## El taglibro de iu virino

En la suba teksto bonvolu trovi la titolojn de Esperantaj libroj kaj sendu ilin tiel, ke ili atingu la redakcion antaŭ la 1a de septembro.

Mi apartenas al la familio Kruk. Mi estas bofilino de sinjoro Tadeo, la ĉefo de la klano. Ni loĝas en la ŝtona urbo Durankulak, kiu situas alte sur la monto. Ni havas ŝtonan domon; en mia buduaro tie staras la lito apud la fenestro. Mi tre ŝatas rigardi tra la fenestro al birdoj, al la blua ĉielo; kaj somermeze mi ŝatas promeni en mia ĝardeno.

Kompilis **Tatjana Auderskaja**

## Juda humuro

### La forgesema Zelig

Judo vizitis sian amikon Zelig sabate posttagmeze kaj trovis lin fumanta cigaredon.

Gasto: Kiel okazas, ke judo fumas dum ŝabato\*?

Zelig: Mi ĵuras al vi ke mi forgesis!

Gasto: Kion vi forgesis? Ĉu vi forgesis ke hodiaŭ estas ŝabato?

Zelig (ofendita): Kiel povas judo forgesi la ŝabaton?

Gasto: Kion do vi forgesis? Ĉu vi forgesis, ke estas malpermesate fumi sabate?

Zelig: Ĉu vi konsideras min infano, kiu forgesus tiom simplan aferon?

Gasto (kolere): Kion do vi forgesis?

Zelig: Mi forgesis ke mi estas judo...

\* Ŝabato: La "juda sabato", kiu daŭras ekde vendredo fruvespere ĝis sabato vesperige. Tiam estas (laŭ la juda religio) la sankta tago, dum kiu oni ne rajtas labori, oni Diservas ktp. La juda religio malpermesas bruligon de fajro dum ŝabato kaj ankaŭ fumadon.

### Kion fari en lernejo?

Diras la juda patrino al sia filo:

— Baldaŭ vi estos 6-jara kaj iros al la lernejo.

Diras la filo:

— Kion mi faros tie? Mi ja ne scias legi kaj skribi...

El la kolekto de **Josi Shemer**

La dua parto de la rememoroj de Petro Stojan kaj plia paĝo de la *Rusa Antologio*, kiuj pro manko de loko ne povis aperi ĉi-kajere, aperos en la sekva, duobla, postkongresa *Ondo*.

*Agrablan kongresan sezonon!*

**LOdE**

## Spritaĵ splitoj kaj preskeraroj

### el la kolekto de reduktoro

#### Jam la putro atingis la kernon

La naturista plago de Brighton <...> troviĝas en la urbo mem. (*Naturista Vivo*, №39; malkovris Ionel Oneţ)

#### Por vere flua Esperanto

... hungaraj esperantistoj malofte konas la elpisaĵon de la tipo: Li, se bonhumora, estas iom laŭta. = Li, se li estas bonhumora, estas iom laŭta. (Blazio Vaha, 29 maj 2009, <http://groups.yahoo.com/group/esp-en-hung/message/16478>)

#### Ne per kako solvon soifanta

Poste el tiu subtaksado rezultis pluraj konfliktoj kaj malperfekaj solvoj en la ellaborita sistemo. (*Libera Folio*, 4 jun 2009, <http://www.liberafolio.org/2009/instruista-retejo-rekonstruota-por-35-000-euroj>)

#### Homarinismo

En la diversaj rubrikoj de <...> *Literatura Foiro*: Origina literaturo: intervjuo de Giorgio Silfer al William kaj Meta Auld pri *La Infara Raso*. (HeKo, №257, 2004 12 31; laŭ <http://www.liberafolio.org/2005/Kurte/heko257>)

#### Li kaj ŝi kaj ni, aŭ: Ŝanĝi sekson per Esperanto

Kroatino, katolika. Ŝiaj ŝatokupoj estas Esperanto, vojaĝo kaj pentraĵo <...> Li esperantistiĝis en 1960 en Zemun. (*Esperantistoj en Serbio*, Beogrado, 2006 p. 341; rimarkis Ionel Oneţ)

#### De kadenco al kadenco, Povilas sen dekadenco

Per unuanima malkaŝa voĉdono <...> Povilas Jegorovas estis elektita al la posteno de LEA-estraro por sekva kvinjara kadenco. (*Litova Stelo*, 2009, №1, p. 12; plian fojon trafis Ionel Oneţ; laŭ NPIV: kadenco = konstanta rapideco, laŭ kiu homo <...> devas labori)

#### Corsetti: Meritita ripozo

Kara Renato, via voĉo estas pripensiinda... (Halina Komar, 1 apr 2009, <http://groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/4378>)

#### Corsetti: Ree kaj senripoze

Kara Reanto, dankon pro viaj personaj opinioj... (Barbara Pietrzak, 22 mar 2009, <http://groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/4303>)

#### Modela labordivido

La tasko de ĉiuj aliaj estas helpi min en mia modesta agado. (Eugeno S. Perevertajlo, 30 mar 2009, <http://groups.yahoo.com/group/uea-membroj/message/13082>)

Plukis **István Ertl**

#### Korekto

En la pasint-kajera ĉefartikolo pri la kultura programo de la Bjalistoka UK estis eraro: Saša Pilipović el Serbio prezentos dramon de Bronstein pri kapitano Postnikov kun du aliaj aktoroj. La muzikon komponis Elena Puĥova. Ĝi estos multimedia historia prezento.

**Tereza Kapista**



# Serio "Mondliteraturo"



En 1993 la eldonejo *Sezonoj* lanĉis la libroserion *Mondliteraturo*, en kiu aperis entute 17 verkoj. La serio estas zorge kompilata kun speciala atento pri la kvalito de la tradukado. La popularecon de la serio atestas la fakto, ke pluraj "mondliteratureroj" elĉerpiĝis baldaŭ post la eldono, kaj ke kelkaj el ili jam estas reeldonitaj.

1. James Leslie Mitchell. *Spartako* (1993). Tradukis el la angla William Auld.
2. Wenceslao Fernández-Flórez. *La malica komizo* (1993). Tradukis el la hispana Fernando de Diego.
3. J.R.R. Tolkien. *La Kunularo de l' Ringo* (1995, 2007). Tradukis el la angla William Auld.
4. J.R.R. Tolkien. *La du turegoj* (1996, 2007). Tradukis el la angla William Auld.
5. J.R.R. Tolkien. *La reveno de la Reĝo* (1997, 2007). Tradukis el la angla William Auld.
6. Arthur Conan Doyle. *La ĉashundo de la Baskerviloj* (1998). Tradukis el la angla William Auld.
7. Georges Simenon. *Maigret hezitas* (1999). Tradukis el la franca Daniel Luez.
8. Lewis Carroll. *Alico en Mirlando* (1999, 2004). Tradukis el la angla Donald Broadribb.
9. J.R.R. Tolkien. *La hobito* (2000, 2005). Tradukis el la angla Christopher Gledhill kaj William Auld.
10. James Branch Cabell. *Jurgen* (2001). Tradukis el la angla William Auld.
11. Lewis Carroll. *Trans la spegulo kaj kion Alico trovis tie* (2001). Tradukis el la angla Donald Broadribb.
12. Georges Simenon. *Maigret kaj la maljuna damo* (2002). Tradukis el la franca Daniel Luez.
13. Georges Simenon. *Amiko el la junaĝo de Maigret* (2004). Tradukis el la franca Daniel Luez.
14. Georges Simenon. *La flava hundo* (2007). Tradukis el la franca Daniel Luez.
15. Jules Verne. *Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj* (2008). Tradukis el la franca Jean-Luc Tortel.
16. Jorge Luis Borges. *La sekreta miraklo* (2008). Tradukis el la hispana Jorge Camacho, Giulio Cappa, Tomasz Chmielik, Fernando de Diego, Liven Dek, István Ertl, Higinio García, Kris Long, Gonçalo Neves, Joxemari Sarasua, Francisco Veuthey.
17. Georges Simenon. *Maigret eraras* (2009). Tradukis el la franca Daniel Luez.



**Kroatio.** Kroata Esperanto-Ligo, Unuiĝo de Prelegantoj de Esperanto kaj Esperanto-Societo Rijeka okazigas ĉiumaje en Kostrena lernejan Esperanto-konkurson. Ĉi-jare (vd. p. 10) konkursis infanoj el dek lernejoj. La plej bonaj sciantoj ricevis belajn pokalojn. (*Tea Radovanović / Boris Di Costanzo*)



**Ĉinio.** Per bon-etosa interkona vespero, aranĝita de lokaj gestudentoj esperantistaj, la 22an de majo komenciĝis en la urbo Harbino, Nordorienta Ĉinio, la unua junulara seminario (vd. p. 7), kiun partoprenis esperantistoj el Ĉinio kaj Ruslando. Ĉu komenco de nova tradicio? (*Shi Chengtai*)



**Pollando.** En la tradicia Scienc-Festivalo en Krakovo (15–16 maj 2009) Studenta Scienca Esperanto-Rondo de la Jagelona Universitato sur la malnova urboplaco prezentis Esperanton, helpe de esperantistoj el ILEI kaj PEA. En la prezentado Maria Majerczak faris provlecionon. (*Andrzej Sochacki*)





JORGE LUIS BORGES  
**La sekreta miraklo**

Jorge Luis Borges. *La sekreta miraklo*  
 Serio Mondliteraturo, Volumo 16  
 200 paĝoj, 18 eŭroj



Jules Verne


**Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj**

Jules Verne. *Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj*  
 Serio Mondliteraturo, Volumo 15  
 208 paĝoj, 20 eŭroj



István Nemere  
**Serpentoj  
 en la puto**

István Nemere. *Serpentoj en la puto*  
 Originala romano pri terorismo  
 184 paĝoj, 18 eŭroj



Georges Simenon

**Maigret  
 eraras**

Serio "Mondliteraturo", No 17

Georges Simenon. *Maigret eraras*  
 Serio Mondliteraturo, Volumo 17  
 128 paĝoj, 12 eŭroj.